

A. S.

LA
MALSPARULO
DE
RAIMUND

VALENTIN

ROSA

FLOTTWELL


ALMOZULO

WOLF

CHERISTANE

AMALIE

FERDINAND HIRT & SOHN LEIPZIG



FERDINAND RAIMUND


LA MALŜPARULO

Originala sorĉfabelo en tri aktoj

Tradukita el la germana lingvo

de

F. Zwach



FERDINAND HIRT & SOHN EN LEIPZIG / 1924
ESPERANTO-FAKO

821.112.2 (436) - 2 = 922

CIUJ RAJTOJ ESTAS REZERVATAJ



495

~~POLSKI ZWIĄZOK PRACOWNIKÓW
ODDZIAŁ W BIAŁYMOSTKU~~

~~ul. Długa 10, Białymostek 67~~

~~Nr. 1000 SP PKO Białymostek~~

~~5513-3825-132~~



PRESEJO BREITKOPF & HÄRTEL, LEIPZIG

ANTAŬPAROLO

Ferdinand Raimund estas unu el la plej konataj kaj plej ŝatataj aŭstraj dramverkistoj el la unua triono de la 19a jarcento. Li naskiĝis en Wien la 1an de Junio 1790. Popoldevena, li komencis lerni la sukerajistan metion. Sed baldaŭ liaj viva fantazio, klerigemo kaj ambicio kondukis lin en tutalian vivosferon. Post kiam li estis venkinta serion da diversaj malfacilaĵoj, li fariĝis aktoro. Kiel tia, li efikis dum dek jaroj kun konstante kreskanta sukceso kaj pli grandiganta populareco. Ne ĉiam kontenta kun la teatraĵoj, kies rolojn li estis devigata ludi, li fine komencis mem verki. Tiel li iĝis konsiderinda reprezentanto de la popoldramo, precipe de la tiutempe moderna sorĉfabelo, distingante sin per potenca formtalento kaj neelĉerpebla, freŝa humoro, kaj se la tiama Viena teatro evoluis de la nura banala arlekeneco al la nivelo de vera dramarto, estas grandparte la merito de Raimund. Esence liaj verkoj prezentas bonsukcesan miksaĵon el la loke origina gajhumoro de la reala vivo, kun la profunda, melankolia seriozeco de vera, kelkloke eĉ klasika poezio, kaj en tiu ĉi kontrasto kuŝas iliaj senkompara ĉarmo kaj neniam velkanta freŝeco¹⁾.

¹⁾ La ekstrema poeziemo de Raimund delogis lin (preskaŭ kontraŭvole), apliki ritmon eĉ inter frazoj de absoluta prozo. Jen la kaŭzo de la apostrofoj, kiujn montras la traduko ankaŭ en ŝajne pure prozaj partoj.

Raimund mortis la 5an de Septembro 1836 en Guten-
stein per propra mano en paroksismo de hipoĥondra
ekscitiĝo, kredante, ke hundo mordinta lin estis rabia.
Lia monumento staras apud la „Deutsches Volkstheater“
(germana popolteatro) en Wien; alia Viena teatro portas
lian nomon. — Kiel la plej eminenta el liaj verkoj estas
konsiderata la sorĉfabelo „Der Verschwender“ (La Mal-
ŝparulo) kun la ĉarmega muziko de la fama komponisto
Konradin Kreutzer.

Tiun ĉi verkon la Loka Komitato por la XVIa Universala
Esperanto Kongreso elektis kun la intenco, prezenti al
la internacia gesamideanaro teatraĵon aŭstrooriginan, lite-
rature altvoloran kaj krom tio sufiĉe amuzan.

La tradukinto.

PERSONOJ DE LA UNUA AKTO

FEINO CHERISTANE (Ĥeristane)
AZUR, ŝia servanta spirito
JULIUS DE FLOTTWELL (Flotvel), riĉa nobelo
WOLF (Volf), lia ĉambristo
VALENTIN, lia lakeo
ROSA (Roza), ĉambristino
CHEVALIER DUMONT (Ŝvajé Dimó) }
SINJORO DE PRALLING (Praling) } amikoj de
SINJORO DE HELM } Flottwell
SINJORO DE WALTER (Valter) }
GRÜNDLING (Grindling) } arĥitektoj
SOCKEL (Sokel) }
FRITZ (Fric) } lakeoj
JOHANN (Johan) }
KELKAJ AMIKOJ DE FLOTTWELL
Servistaro, ĉasistoj, silfoj, genioj

PERSONOJ DE LA DUA AKTO

JULIUS DE FLOTTWELL
CHEVALIER DUMONT
WALTER
KELKAJ GASTOJ
PREZIDANTO DE KLUGHEIM (Klughajm)
AMALIE, lia filino
BARONO FLITTERSTEIN (Fliterŝtajn)
WOLF, ĉambristo

VALENTIN
 ROSA
 KASTELANO
 JUVELISTO, KURACISTO
 BETTI (Beti), ĉambristino
 SERVISTO, KELESTRO, ALMOZULO, MALJUNA VIR-
 INO, KURACISTO
 MAX (Maks) } ŝipistoj
 THOMAS (Tomas) }
 Dancistoj, dancistinoj, gastoj
 (La okazaĵo ludigas tri jarojn pli malfrue.)

PERSONOJ DE LA TRIA AKTO

FEINO CHERISTANE
 AZUR, ŝia servanta spirito
 JULIUS DE FLOTTWELL
 SINJORO DE WOLF
 VALENTIN Holzwurm (Holcvurm), majstro lignajisto
 ROSA, lia edzino
 LISE (Lize) }
 MICHEL (Miĥel) } liaj infanoj
 HANSEL (Hanzel) }
 HIESEL (Hizel) }
 PEPI
 ĜARDENISTO, LAKEO
 Lakeoj, genajbaroj, vilaĝanoj, paŝtistoj paŝtistinoj
 (La okazaĵo ludigas dudek jarojn pli malfrue.)

UNUA AKTO

UNUA SCENO

Vestiblo en la kastelo de Flottwell kun unu meza kaj kvar flankaj pordoj, antaŭe fenestro. Servistaro en riĉa livreo estas okupata en la salonego. Kelkaj portas sur argentaj pletoj kafon, teon, ĉampanon, brositajn vestojn al la ĉambroj de la gastoj. Fritz kaj Johann disponas. Kelkaj ĉasistoj purigas pafilojn.

ĤORO

Vigle! portu sen prokrastoj
 Kafon, vinon de ĉampan',
 Rumon, vestojn por la gastoj,
 Pli rapidu ĉiu an'!
 Inda montru la kastel'
 Sin de l' riĉa moŝt' Flottwell!

(En la korto eksonas ĉaskornoj. Fritz kaj Johann alpaŝas la fenestron.)

FRITZ. Jes, blovu nur! Vi povas ankoraŭ longe blovi, la sinjoroj nur nun leviĝis. Hodiaŭ estos malfrua ĉaso.

JOHANN. La ludado ja daŭris ĝis la dua horo!

FRITZ. Jes, kiam ili komencas ludi post la vespermang'o, tiam estas neniam fino.

JOHANN (*ridante*). Sed hodiaŭnokte ili bone senplumigis la estron.

FRITZ. Mi koleras, ke li tiom malgajnas.

JOHANN. Kial do? Li ja ne volas ĝin alie. La riĉaj homoj pagu la enuon, kiun ili kaŭzas al aliaj.

FRITZ. Ho! pri nia sinjora moŝto oni nenion diru, li estas vere nobla viro. Li ne nur gastigas siajn amikojn, li subtenas la tutan mondon. La vilaĝanoj, kiel mi aŭdis, pagas ja preskaŭ neniam imposton.

JOHANN. Laŭ mia gusto li nur havas tro fortajn pasiojn. Atendu, ĝis vi lin foje ekvidos en furiozo! Tiam li indulgas nek sian nek alies feliĉon. Tiam ĉio povas ruiniĝi.

FRITZ. Sed kiam li rekonsciigas, tiam li kompensas certe trioble.

JOHANN (*ekskuante la ŝultrojn*). Jes, se ĝi nur ĉiam daŭros tiele!

FRITZ. Kiu do estas la juna viro, alveninta hieraŭ? Ĉarma homo.

JOHANN. Tion mi ne scias, tio ja montriĝos. Por mi ekzistas nur duspecaj homoj. Homoj, kiuj donas trinkmonon, kaj homoj, kiuj donas nenian. Tio decidigas mian servemon.

FRITZ. Mi trovas lin tre beleta.

JOHANN. Tial li supozeble tre malmulte donas. Kiu pridonacas min per ĝentilaĵoj, melankoliigas min; sed kiam iu teren ĵetas dukaton kaj ekkrias: levu ĝin friponeto! — tiam mi pensas: Ho, kia ĝojo, esti friponeto!

DUA SCENO

La antaŭaj. Pralling.

PRALLING (*paŝas je unu paŝo el sia kabineto kaj krias*). He! lakeoj!

JOHANN kaj FRITZ (*turniĝas*). Jes, kion vi deziras?

PRALLING. Mi jam dufoje sonoretigis. Ĉu vi volas esti tiel komplezaj kaj alporti rumon al mi?

JOHANN (*distinge kapklinetas*). Tuj, sinjoro! (*al Fritz*) — Ĉu vi aŭdis lin? Li ne donis al mi dum ses semajnoj eĉ unu fenigon da trinkmono; tiun mi lasas atendi.

FRITZ. Ho, tiun mi ankaŭ ne priatentas, la sinjoro ja ne tre ŝatas lin.

JOHANN. Jen tio, kion oni devas konsideri. Ankaŭ la ĉambristo lin ne volas.

FRITZ. Nu, se tiu lin ne volas, tiam li fortrotu baldaŭ el la kastelo. Tiu jam klopodos por sufiĉe kalumnii lin.

JOHANN. Jes, li rajdas sur la favoro de la sinjora moŝto kaj neniu kapablas elseligi lin.

FRITZ. Vi ja konas lian devizon: Ĉion je profito de mia sinjora moŝto! — kaj dume li plenŝtopas siajn poŝojn.

JOHANN. Sed tio ankaŭ estos bona lavado, se foje liaj trompaĵoj malkovriĝos. Mi ne konas pli ruzegan friponon; unu el ni estas ja vere nenio kontraŭ li.

TRIA SCENO

La antaŭaj. Wolf.

WOLF (*lia konduto kontraŭ la servistoj estas tre laŭ-nobela kaj fiera, kontraŭ superuloj tre humila; aŭdas la lastajn vortojn*). Jam denove konferenco! Pri kiu vi parolas?

JOHANN. Pri bona amiko.

WOLF. Nu, vi estas indaj je tia amikeco! Ĉu estas prizorgita ĉio? Ĉu la gastoj priservitaj?

JOHANN. Plej akurate.

WOLF. La sinjora moŝto malpermesigas al vi, preni donacaĵojn de la gastoj. Vi atendu ilin de lia malavareco.

AMBAŬ. Tiam ni gajnis per tio.

WOLF. Estu malegoistaj, tio estas granda virto.

JOHANN. Sed tre malfacila. — Ĉu ne vere, sinjoro ĉambristo?

WOLF. Kiĉ estas Valentin? Ĉu li alportis la kyitancon de la kantistino?

FRITZ. Li ankoraŭ ne revenis, kvankam la sinjora moŝto ordonis, ke li venu al la ĉaso, por ke la sinjoroj havu ion por ridi dum la ĉasado.

WOLF (*ridetante*). Vere maldanĝera knabego.

JOHANN. Jen, sinjoro ĉambristo devus plenumi agon de kompato kaj eldomigi la vulgaran bubegon.

WOLF. Dio gardu min de tia maljustaĵo! Tio estus kontraŭ la bonintenco de mia sinjora moŝto. La knabego ja estas malgracia kaj kruda, sed bonanima kaj fidela. Krome, li estas favorata de la sinjoro, kiu amas ĉiujn siajn servistojn, kvazaŭ proprajn infanojn. Jes, li certe estas malofta viro, kiu ne trovas samspecan en la mondo. Kaj volante librojn skribi je lia laŭdo, oni neniam ĝisatingus la finon. Tial danku la ĉielon, kiu kondukis vin en ĉi tiun domon, ĉar kiu servas lin fidele, estas vere servinta sin mem. La matenmanĝon por la sinjora moŝto!

FRITZ. Tuj! (*foriras*).

JOHANN (*forirante*). La moraleco de tiu homo min ankoraŭ subterigos (*for*).

WOLF. Jen paro da ruzegaj friponoj, de ili mi devas liberigi min.

KVARA SCENO

La antaŭa. Arĥitekto Gründling.

GRÜNDLING. Bonan matenon, sinjoro ĉambristo! Ĉu mi povas havi la honoron, prezenti min al sinjoro de Flottwell?

WOLF. Sinjoro arĥitekto, mi devas peti pardonon, sed lia moŝto ĵus ordonis al mi, senkulpigi lin je ĉiu, ĉar hodiaŭ lia moŝto entreprenos ĉasekskurson.

GRÜNDLING. Ĉu vi ne scias, sinjoro ĉambristo, ĉu sinjoro de Flottwell jam aprobis mian planon por la konstruo de la nova kastelo?

WOLF. Ĝi tre plaĉis lin. Sed okazis la cirkonstanco, ke ankaŭ alia arĥitekto prezentis al li similan planon,

kaj promesas, konstrui la kastelon en la sama grandeco je dek mil guldenoj pli malmultekoste.

GRÜNDLING. Tion mi bedaŭras, sed kiel honesta viro mi ne povas laŭ liaj ordonoj konstrui ĝin pli malkare. Mi entute transprenas ĉi tiun konstruon pli pro ambicio ol pro gajnemo. Sed, se sinjoro de Flottwell trovis artiston, de kiu li atendas ion pli bonan, aŭ pli belan, tiam mi scios rezigni.

WOLF. Ĉu tio signifas, ke ĝi por vi ne gravas?

GRÜNDLING. Male, por mia honoro, ĝi estas tre grava.

WOLF. Ja, tiam vi devas ankaŭ transcedi pro via honoro malgrandan oferon.

GRÜNDLING. Bedaŭrinda estus la arto, se ĝi estus atinginta la staton, kiu devigus la artistojn, doni oferojn por havi okazon, produkti artaĵojn. Subteni la arton estas ja la fiero de la eminentuloj kaj priŝpara eldiro de la monfama sinjoro de Flottwell estus neaŭditaĵo.

WOLF. Vi ne komprenas min, sinjoro arĥitekto.

GRÜNDLING. Sufiĉas! Morgaŭ mi pri tio mem volas paroli kun sinjoro de Flottwell. Sed ne kredu, sinjoro ĉambristo, ke mi estas viro, kiu ne scias vivi! Se vi sukcese pledos pri tiu afero ĉe la sinjora moŝto, mi sentos min tre honorata, se vi ne malakceptos donacon de cent dukatoj.

WOLF. Vi malĝuste prijuĝas min. Egoismo ne estas mia afero, mi parolas nur por bono de mia moŝtsinjoro!

GRÜNDLING. Tiun celon vi atingos pli bone, ol se la kastelo estos konstruata de iu alia pli malkare kaj pli malbone.

WOLF. Nu bone! Mi volas provi, kion mia modesta influo povas atingi por la favoro de tia granda artisto; kaj se mi sukcesos, tiam mi akceptos vian donacon nur je la kondiĉo, ke vi al mi permesu, uzi ĝin en bonfara maniero por aliaj.

GRÜNDLING. Tute laŭ via plaĉo. (*flanken*) La arto pardonu al mi ĉi tiun malindigon. (*laŭte*) Morgaŭ mi atendos favoran decidon (*volas for*).

WOLF (*rigardas tra la fenestro*). Diablo! La alia, (*rapide*) ĉu vi ne volas esti tiel afabla kaj iri laŭ la flanko ŝtuparo, ĉar sur la granda la servistoj transportas meblojn. Mi sindone riverencas. (*Elirigas lin tra la flanko pordo*.) Ĉi tiu citrono donas malmulte da suko, nun mi volas premi la alian.

KVINA SCENO

La antaŭa. Arĥitekto Sockel.

SOCKEL. Bonan matenon, sinjoro de Wolf! Vi vokigis min, mi estus veninta jam hieraŭ, sed mi devis apogi domon, kiun mi konstruis nur antaŭ du jaroj. Ĉu vi komprenas? Mi diras al vi, oni nun preferus lignon haki anstataŭ konstrui domojn. Unue ili bakas brikojn, kiuj dispeciĝas pro ĉiu laŭta vorto. Poste ili volas ĉiam enspezi almenaŭ unu milionon da lupago kaj postulas nur ĉambrojn, neniujn murojn. Ĉu vi komprenas? Tial estas kelkaj modernaj domoj ankaŭ tiel maldikaj, kvazaŭ ili estus nuraj ingoj ĉirkaŭ la malnovaj. Plue, arĥitekto antaŭ tempoj ja povis fidi je solidaj loĝantoj, sed nun eniĝas kelkfoje popolo, kiu nur luktaĉas kaj interbatas, tablon kaj seĝojn renversas kaj ĉion ĥaosigas. Ja, de kie prenu tiam domo la paciencon? Tial ĝi do incite krevetas kaj fine pro kolero disfalas. Ĉu vi komprenas? WOLF. Tio estas tute ĝusta; sed nun ni interparolu prudente.

SOCKEL. Permesu — sed miaj paroloj estas vera triumfo de prudenteco! Ĉu vi komprenas?

WOLF. Mi estas dironta al vi la malagrablan sciigon, ke vi ne ricevos la konstruon de la kastelo.

SOCKEL. Ĉesu aŭ mi disfalegos kiel malnova ĝardenmuro! Tio ja estas laŭ nia interkonsento neebla. Ĉu vi komprenas?

WOLF. La sinjoro moŝto volas komisi la arĥitekton Gründling.

LAKEO (*kiu estis alportinta al Flottwell la matenmanĝon, revenas*).

SOCKEL. Sed estis ja ĉio jam en ordo. Mi ja al vi mil...

WOLF (*rapide alrigardante la serviston*). Nu jes, vi diris al mi mil kaŭzojn, kiuj —

SOCKEL. Ne, mi promesis al vi —

WOLF. Jes (*kolerete batas per piedo*), vi promesis, preni bonajn materialaĵojn. Franz, tie iu sonorigis. (*La lakeo foriras en kabineton*). Sed mi ne estas kulpa, se venis iu alia, kiu faris eĉ pli grandajn promesojn kaj konstruos la kastelon je dek mil guldenoj pli malkare.

SOCKEL. Sed tiu estas mizera homo, kiu tute ne kapablas konstrui — alkurinta ĉefmasonisto, fuŝisto — kaj mi estas viro ĝusteloka! Ĉu vi komprenas?

WOLF. Granda honoro por vi, ke vi tiel insultas pri via kolego, sed tio povas nur pli malbonigi la aferon.

SOCKEL. Sed vi ja malesperigas min. (*flanken*) Mi la konstruon ne povas ellasi, ĝi profitigas al mi tro multe (*faras kontraŭ la publiko la geston de monkalkulado*). Ĉu vi komprenas? (*Laŭte*) Plej kara sinjoro ĉambristo, mi scias, ke tio dependas nur de vi. La sinjoro moŝto ne atentis pri ĝi, li estas tro facilanima. Mi donos al vi mil guldenojn de konvencia mono.

WOLF. Sinjoro! — Kion vi kuraĝas —

SOCKEL. Mi kuraĝas proponi al vi ankoraŭ kvincent guldenojn.

WOLF. Vi ja amasigas ofendon sur ofendon.

SOCKEL. Certe, mi estas la plej brutula homaĉo en la mondo. Sed nun mi jam estas en mia malĝentileco; mi devas al vi proponi ankoraŭ kvincent guldenojn.

WOLF. Haltu! vi indignigas min per tiaj malmoralaj prisupojoj.

SOCKEL (*flanken*). Ho, jen oni preferus senkapigi sin mem!

WOLF. Mi konsentas, ke via honoro —

SOCKEL. Ho, kia honoro! Ĝi ja ne estas fakte malhonoru, se oni konstruas kastelon, sed en fajro orumita oni tamen ne estos pro tio. Nur la mono perdiĝos.

WOLF. Oni vin priridos.

SOCKEL. Certe, la tuta urbo ĝin eksciis.

WOLF. Kiel tio ebligis?

SOCKEL. Ĉar mi ĝin diris al mia edzino.

WOLF. Ja, ĉu vi do estas edziĝinta?

SOCKEL. Bedaŭre! Ĉu vi komprenas?

WOLF (*timeme*). Havas eble infanojn?

SOCKEL. Jes, certe!

WOLF. Ho, tio ja estas tre malĝojiga! Kiom?

SOCKEL. Mia Dio, kiom mi volas, havigu al mi nur la konstruon!

WOLF. Ja, tion mi devas scii.

SOCKEL. Kvin. Ĉu vi komprenas?

WOLF. Terurege! Tio kortuŝas min.

SOCKEL. Lasu vin kompatigi! Prenu la du mil guldenojn!

WOLF (*kun kompato*). Vi estas fameliestro! Vi havas kvin infanoj! Kial vi tion ne tuj diris? — kaj la alia eble ne havas infanojn.

SOCKEL. Eĉ ne unu solan.

WOLF. Ho, tiam vi ja devas ricevi la konstruon! Tio ja estus la plej granda maljustaĵo —

SOCKEL. Ho, vi noblanima viro!

WOLF. Nun mi povas akcepti vian donacaĵon. Sed vi devas promesi al mi, starigi majstroverkon por la eterneco.

SOCKEL. Dum dek jaroj nenia riparo.

WOLF. Ĉar la bono de mia sinjora moŝto estas por mi la ĉefaĵo.

SOCKEL (*plorante*). Granda animo!

(*Ambaŭ for en la kabineton de Flottwell.*)

SESA SCENO

KANTO

VALENTIN. Hajsa! gaje zorgosene,
Mi ĉi tie vivas tre,
De neniu pruntoprene
Belan vivon de lake'.
Mi unue elegante
Estas viro laŭ statur',
Kun la poŝ' monenhavanta —
Granda por knabin' plezur'.

Due mi toleri scias
Kiel pia ŝafobest';
Pri prudent' mi ne mencias,
Malpermesas ĝin modest'.
Trie mi ja kantas bele
Kaj de mia voĉ' tenor'
Sonas tiel forte, hele,
Ke la homoj kuras for.

Kvare scias skribi, legi,
Eĉ kalkuli iom mi,
Kiel lignajisto segi —
Estis mia profesio'.
Kvine, sese, sepe, oke —
Mi ne plu memoras ĝin,
Tial estu senrevoke
Jam de mia kanto fin'.

Nu, foje mi hodiaŭ prave povas diri: en matenhor' alvenas or'. La kantistino, kiu lastfoje dum nia koncerto kantis ĥinan arion, donacis al mi pro la honorario, kiun mi estis alportinta al ŝi de la sinjora moŝto, du purajn dukatojn. Sed la sinjora moŝto ja devis pagi al ŝi por unu sola ario kvindek dukatojn. Tio estas bela mono. Sed ĝi estas nenio kompare al Anglujo! En Londono ili eĉ kantas laŭ la pezo. Tie kostas unu de la grandaj notoj tutan funton, tial oni ankaŭ nomas ilin funtnotoj. Tiamaniere gajnas unu persono en unu sola vespero kelkajn centfuntojn. Tiuj devas ĉiam havi paron da ĉevaloj por postveturigi al si la honorarion. Sed ĉi tiu kantistino estis ja efektive dieca! Mi ja komprenas iom pri muziko, ĉar en mia junaĝo mi estis ofte batata laŭ notoj, sed koncerne la distonadon, neniu ŝin egalas. La tutan arion mi ne povis aŭdi, ĉar mi estis malsupre en la korto kaj kvietigis la ĉashundojn, por ke ili ne tiom bojegu; sed foje ŝi eligis krion — mi aŭdis krii diversajn personojn, sed ĉi tiu tono ekskuis mian plej internan internon! Sed la plej belan ŝi tamen aŭdigis tiam, kiam ŝi ĵetis la du dukatojn sur la tablon: tio faras ŝin senmorta.

SEPA SCENO

La antaŭa. Rosa (*enŝteliras kaj aŭdas la sekvantajn vortojn*).

VALENTIN. Kaj ŝi alridetis min!

ROSA. Nu, kaj kiel ŝi do ridetis? (*Ridetas malice.*) Kiel do? Ĉu ŝi tiel ridetis — tiel? —

VALENTIN. Ho, ĉesu do. Tio ja estas nur travestio pri ŝia rideto. Vi do ne imagos, ke vi ĝin ankaŭ kapablas?

ROSA. Kial? Kial ŝi sciu pli bone ridi ol mi?

VALENTIN. Nu, persono, kiu ricevas por unu ario kvindek dukatojn, tiu do scias kurioze ridi.

ROSA. Jes, sed kiu lasta ridas, plej bone ridas, kaj tiu estos mi! Mi ne bezonas tian amanton, kiu kuras en la urbon kaj amindumas kun la teatraj principidinoj.

VALENTIN. Mi devas fari, kion mia sinjoro al mi ordonas. Punktum!

ROSA. Vi kaj via sinjoro estas unu kiel la alia.

VALENTIN. Nu, pri tio mi konsentus, tiam mi estus ankaŭ milionulo kiel li.

ROSA. Kaj kiel vi do ree aspektas? La tutan tagon oni lin devas korekti. Ĉu ĉi tio estas ligita koltuko, vi malfirma homo? Venu ĉi tien! (*ligas al li la koltukon*).

VALENTIN. Do ĉesu — vi min ja sufokos, ne kunŝnuru min tiel.

ROSA. Tio devas esti.

VALENTIN. Ne, la ŝnurado estas tre malsaniga. Ĝi tute elmodiĝos. Vi ankaŭ ne kunŝnuru vin tiel.

ROSA. Tio neniun koncernas.

VALENTIN. Sed tamen! La ŝnuradon oni ja volis leĝe malpermesi, sed la mastroj protestis.

ROSA. Jes, *à propos*! Vi ja staras ĉi tie, kvazaŭ estus hodiaŭ festotago! Tuj iru kaj vestu vin por la ĉaso.

VALENTIN. Nun mi ree devas iri al ĉi tiu malbenita ĉaso.

ROSA. Ja kiu estas kulpa, ke vi estas tia bona ĉasisto?

VALENTIN. Ah, mi ja ne ĉasas, mi estas ĉasata! Ili min ja tute ne traktas kiel ĉasiston. Mi ja apartenas inter la ĉasbestaro. Lastan fojon la sinjora moŝto mortpafis sovaĝan anason, kaj, ĉar neniam ĉashundo estis preta, tial mi devis alporti ĝin el la akvo; kaj kiam mi estis en la mezo de ĝi, ili min ne plu ellasis.

ROSA. Kaj ĉion ĉi tion vi toleras?

VALENTIN. Jes, ĉar pro mia sinjoro mi iras en fajron, tial mi do ankaŭ iras pro li en akvon.

ROSA. Nu, rapidu, ĝi tuj komenciĝos.

VALENTIN. La malbenita ĉaso! Se oni nur ne tiel mal-satiĝus! Sed mi certigas vin: ĉasisto kaj la hundo manĝegas en ĉiu sekundo.

ROSA. Hontu do.

VALENTIN. Vi ne kredas, kiom oni suferas, kiel la gastoj onin turmentas. Je mia animo, se ne estus pro la sinjora moŝto, mi bategus ilin ĉiujn kune.

ROSA. Ne parolu do ĉiam pri bategoj en distinga domo. Tiel oni tuj vidas, ke vi kreskis inter lignaĵoj.

VALENTIN. Ne riproĉu al mi ĉiam mian lignaĵistan profesion.

ROSA. Ĉar vi estas tiomege fosteca.

VALENTIN. Ne insultu mian metion.

ROSA. Lasu min iri! Mi prenos al mi alian. Mi jam scias kun kiu mi geedziĝos.

DUETO

ROSA. Mi prenos seruriston nur,
Li estas vir' laŭ dec',
Li zorgos ĉiam per serur'
Por nia sekurec'.

VALENTIN. Ne estas seruristo la
Unua tie ĉi,
La lignaĵisto faras ja
La pordon antaŭ li.

ROSA. Tro nigra estas tiu vir',
Tro arda lia am'.

VALENTIN. Do se ekamas vin barbir',
Ĝi estos pro reklam'.

ROSA. Tornisto plaĉas al mi tre,
Li estus mia kaz'.

VALENTIN. Sed gardu vin, li povas, vel
Vin gvidi je la naz'.

ROSA. Bakisto estas grava tro,
Mi timas pro enu'.

VALENTIN. Jen prenu kaldroniston, ho!
Sufiĉa estas bru'.

ROSA. Sed efektive kun tajlor'
Mi vivus sen ĉagren'.

VALENTIN. Se restos la klientoj for,
Finiĝos la faden'.

ROSA. Ladisto estas certa vir',
Al li ne mankas lad'.

VALENTIN. Ŝuist' vin estu pro la cir'
Kaj peĉ' vivkamarad'.

ROSA. Mi prenos edzon sen ŝancel'
El ĉapelista rond'.

VALENTIN. Sed ne necesos la ĉapel',
Se l' kapon perdos mond'.

ROSA. Mi vidas, ke laŭ cirkonstanc'
Do estas tie ĉi
Nun tamen la plejbona ŝanc'
La lignaĵist' por mi.

VALENTIN. Al lignaĵisto sen kondiĉ'
Konfidu vin kun em',
Krevetos iam la feliĉ',
Li ĝin kungluos mem.

AMBAŬ. Do bela stato, je honor',
Jen estas la meti';
Ĉu la ŝuist', barbir', tajlor',
Al ili trinkas mi. (Ambaŭ for.)

OKA SCENO

Helm (en ĉasvesto), Pralling (venas el sia kabineto), Wolf
(el la ĉambro de Flottwell.)

HELM. Nu, kio do sinjoro ĉambristo, ĉu ĝi baldaŭ komenciĝos?

WOLF (*tre okupata*). Ho certe, la sinjora moŝto tuj aperos (*kuras al la fenestro*). Heda, ĉasistoj, aŭdigu vin! Paĝioj, alkonduku la ĉevalojn! Pafilstreĉistoj, tuj rapidu supren! (*oni aŭdas ĉaskornojn*).

HELM. Hola, hola, vigle do sinjoroj! Venu for, la danco komenciĝas.

(*Kelkaj gastoj venas parte el la mezo, parte de la flankaj pordoj, ankaŭ Pralling, ĉiuj estas vestitaj por ĉaso.*)

PRALLING. Bonan matenon ĉiuflanken.

ĈIUJ (*reciproke*). Bonan matenon! Ĉu vi bone dormis?

HELM. Ho, fulmotrondro, kia malbonega nokto!

PRALLING. Servist' maltaŭga estas mia dormo, kiam mi ĝin vokas, ĝi ne venas.

HELM. Ĝi estas vir' libera kaj nur venas, kiam mem ĝi volas.

WALTER. Koketulin' ĝi estas, afektanta antaŭ ĉirkaŭpreno.

NAŬA SCENO

La antaŭaj. Chevalier Dumont (*en eleganta ĉasvesto. Li rigardas tra simpla lorneto. Li prononcas francmaniere*).

DUMONT. Ah, bon jour mes amis. Kiel vi dormis?

ĈIUJ. Ho, nia naturamiko.

DUMONT. Jes, *Messieurs*, la naturo estas granda. Mi ree diboĉadis en ĝiaj ravoj. La tutan nokton mi kuŝis en la fenestro por observi la pejzaĝon. O, *charmant!*

DEKA SCENO

La antaŭaj. Flottwell. Sockel.

FLOTTWELL. Bonan matenon, noblaj amikoj!

ĈIUJ. Bonan matenon! (*Kelkaj skuas lian manon.*)

FLOTTWELL. Ni havos ĉasmalfruon. Mi esperas, ke la sinjoroj, ripozintaj la unuan fojon en kastelo mia, estis tiel plenkontentaj pro la priservado, kiel mi ĝin povas

fervorege nur deziri. Ankaŭ mi volonte estus regalinta vin per dolĉaj sonĝoj, sed bedaŭre, tiujn mi en mia serv' ne havas.

GASTO. Mi sonĝis pri lilioj.

HELM. Kaj pri aprino mi, ke mi ĝin mortponardis.

WALTER. Mi vidis la gastamon ĉe la ora tablo kaj germana laŭ' ornamis ĝian kapon.

PRALLING. Mi metis mian tutan ŝancon sur la kerreĝinon, kaj kiam mi malgajnis, mi vekigis.

FLOTTWELL. Kaj kion sonĝis vi, amiko Valentin?

VALENTIN. Mi sonĝis, ke via moŝto donacis al mi kvar dukatojn.

FLOTTWELL (*ridante*). Jen egoista sonĝo, sed mi ĝin plenumos.

VALENTIN. Mi kisas la manon, via moŝto.

FLOTTWELL. Kion sonĝis mi, ĉi tion mi al vi ankoraŭ ne malkaŝi povas. Ho, estis dolĉa sonĝ', favora al plej alta mia kordeziro, al mi ĝi speguligis rozkolore mian vivestonton.

HELM. Vi certe sonĝis ja pri rendevuo, pri okuloj kiel la rubenoj kaj pri tiaj malsaĝaĵoj.

FLOTTWELL (*ridante*). Iomon eble vi divenis, kara frato. Ĝi estos rendevuo por la tuta vivo. Sed mi silentu pri ĉi tio; hodiaŭ mia koro estas petolema kaj povus sin perfidi.

PRALLING. Ni jam ruzaĵojn viajn konas, vi pensas pri alia ĉas' ol ni.

FLOTTWELL. Jen efektive jes. Postkuru viajn ĝojojn, pri mi vi nebezonas zorgi. Diversajn havas ni pasiojn.

PRALLING. Artriton mi suferas.

HELM. Ĉasisto mi pasia estas.

WALTER. Mi ŝatas la ĉampanon.

DUMONT. Kaj mi admiras la naturon.

HELM. Mi miras pri ĉi tio, kavaliro, vi estas ja miopa.

DUMONT. Tio estas ĉiuj homoj.

PRALLING. Kaj kiam vi veturas, vi dormas en kaleŝo.

DUMONT. Egale. Vera naturamiko admiras ĝian belecon ankaŭ en la dormo.

HELM. Ĉi tion mi ne povas. Mi preferas ĉason.

FLOTTWELL. He do! Alportu vinon de Bordeaux, ke la sinjoroj entuziasmiĝu.

DUMONT. Malfermu la fenestrojn, ke povu mi observi la pejzaĝon (*rigardas tra la vitro*).

WOLF. Jen estas Bordeaux. (*Li ordigas la servistojn, kiuj jam staris pretaj kaj prezentis ĝin en kalikoj sur arĝentaj pletoj.*)

WALTER (*krias*). Bonega vino.

DUMONT (*ravita ĉe la fenestro krias*). Ĉiela akvofalo.

FLOTTWELL (*svingas la glason*). Je la eterna amikeco kaj longa viv', sinjoroj.

ĈIUJ. La riĉa Flottwell vivu longe!

DUMONT (*kiel antaŭe, ne preninte glason*). Ho! kiel bele sin prezentas tie la tombejo.

FLOTTWELL. Ho, se mi superriĉa estus! Mi ĝin dezirus esti nur, por kun la mond' dividi la trezorojn. Riĉaĵoj, kio ili estas do! La monon oni tro estimas. Tial ĝi fieras. Neniam volas resti ĝi en poŝ' de malriĉulo, kaj ĉiam nur al riĉa hom' fluegas.

PRALLING (*entuziasmigite*). Ho, kiu estas tiel bona kiel nia nobla Flottwell.

WALTER. Neniun konas mi animon, kiu lin egalas.

ĈIUJ. Ho jes!

DUMONT. *Un enfant gâté de la nature.*

FLOTTWELL. Ne laŭdu min tro multe. Ho, neniun havas mi meriton, krom de mia patro l' monon. Se la mondo ĝin al mi pardoni volas, estas bone, kaj se ne,

ĝi mem ordigu tion kun envio sia. Mi ne batalas kontraŭ ĝi; feliĉo mia estas kuraĝega, ĝi incitas min; mi tial grandioze volas ĝui mian eston, kaj volas zorgoj min viziti, tiam mi ŝajnigos min, ne esti hejme. Al filozofoj malserenaj mi ne kredas. Ĉu ne, amiko Helm, la vivon oni devas kapti je la bela flanko! Simbolo ĝia plej belega estas la ĉiel', la arda sun' similas al varmega brul' de l' am', la milda luno al intima amikeco. La riĉa aro de la steloj estas bildo de la milionaj ĝojoj, kiuj en la vivo ĝermas. La seriozaj nuboj certe estas zorgoplenaj tagoj, sed gaja sento estas vent' flugema, ilin forpelanta.

SOCKEL. Dia homo! Vera dia hom'. Ĉu vi komprenas?

FLOTTWELL. Donu ankaŭ glason do al nia brava arĥitekto. Ho, li tre grava viro estas tie ĉi, sinjoroj, kastelon novan li al ni konstruos kaj tiujn halojn ĉi ni ne maledu plue al la tempo. Flottwelldomo estu ĝi nomata. Ankoraŭ glason je la verko de ĉi tiu honestulo.

SOCKEL (*ektimas kaj faligas la glason*). Ĉu vi komprenis?

ĈIUJ (*svingas la glasojn*). Flottwelldom'! Ĝi longe staru!

FLOTTWELL (*rapidege eltrinkas glason*). Kaj nun al ĉas', sinjoroj. Ĵetu for la glasojn kaj ekprenu la pafilon. La arbar' propraĵo via estas kun la tuta ĉasbestaro. Sed tiun ne tro pelu, mi ne ŝatas tion, ĉar la cervo ploras kiel hom', se oni ĝin turmentas ĝis la morto. Kaj kiam mi spektaklon tian vidis, mi perdis la ĉasistan kruelecon. Feliĉon nun al ĉaso! La vespero ree nin kunigos tie ĉi, kaj tiam ni ĉe plena glaso priparolos, kiu povas ĝoji pri pli nobla venko? Vi aŭ mi! (*for, kornoj eksonas.*) ĈIUJ. Hola, al ĉas'! (*ĉiuj for.*)

DUMONT (*restas ĉe la fenestro ĝis kiam la aliaj estas ekster la pordo; tiam li krias*): Ĉiela naturo! (*sekvas.*)

MELODRAMO

Poste dum plensona muziko scenejsanĝigo je ora fehalo, mal-antaŭe kun la elvido al ĉarma montoregiono. En la mezo de la halo granda rondforma magispegulo, antaŭ ĝi ora altaro kun ofervazo sur ŝtupoj. Cheristane, vestita per faldohava robo kun magiaj ciferaĵoj kaj kun kapo ornamita per ora krono, venas de la flanko, portante oran libron kaj magian bastonon.

DEKUNUA SCENO

CHERISTANE (sola)

La lukt' finiĝis, mi min venkis mem.
Nun laŭ destin' mi iras for de l' tero,
Kaj kvankam kor' ŝiriĝas pro ĉagren',
Mi savos lin per mia korsufero.

(Ŝi forprenas de la meza pinto de sia krono bluan perlon.)

Ho, venu perlo, ujo de l' geni'
Kaj lasta minservant' en ĉiu faz'!
Vi neniĝos baldaŭ ja por li,
Mi vin oferos en ĉi ora vaz'.

(Ŝi ĵetas la perlon en la oran vazon. Blua flamo ekbrul-igas en ĝi, la tondro rulsonas, mallonga konvena muziko. La spegulo kovriĝas per fumo.)

Sin montru via kap' en sorĉpurpur',
Per diamantokuloj min rigardu.
Aperu tuj! Kaj nomu vin Azur',
Kaj en esper' min viaj vortoj hardu.

(Muziko, terura tondrobato. La fumo leviĝas kaj en la spegulo aperas Azur, egipte vestita kun vualita kapo, la duonnudaj brakoj kaj la viz aĝo briletas blue, anstataŭ la okuloj lumas du brilaj ŝtonoj. Magia lumino.)

DEKDUA SCENO

La antaŭa. Azur.

AZUR. Vi, kiu min per sorĉpotenco naskis, ĉu por malben' aŭ ben' ordonas min?

CHERISTANE. Al gardgeni' de Flottwell mi vin taskis.

AZUR. Ĉu rajtas mi laŭ libro de l' destin'?

(Dum la sekvontaĵo tremetanta muziko.)

Nenia sort' sur vivovoj' lin gvidu;
Li pri fatal' aŭ beno mem decidu;
Averti do li povas sin nur sole,
Akiri malfeliĉon propravole,
Kaj ĉar la sort' ne agos laŭ mentoro,
Do li sin savu mem de l' malhonoro.

CHERISTANE. Mi konas la verdikton de l' destin',

Por mi ĝi estas severega pun'.
Jen orsorĉlibro mia, prenu ĝin,
El ĝi pri ruzo vi ekscios nun
De mi trovita en la amturment'.
Sed mi foriĝas laŭ pli alta vol'.
Do estu vi l' plenuma instrument'
Kaj ne min hejmenlasu sen konsol'.

AZUR (prenas la libron). Hejmiru nur, mi servos vin fidele,
Kaj vi min vidos ree post la savo.

CHERISTANE (muziko). Ho, kial venis mi, ĉar tro kruele
puniĝis tiu ĉi feliĉa ravo.

(Ŝi surgenuas kaj klinas la kapon zorgoplene antaŭ la altaro. Dum plena muziko ŝanĝiĝas la scenejo je mallonga arbaro. Flanke monteto kun malalta arbeto.)

ĈASISTA ĤORO (ĉasistoj marŝas trans la scenejon).

Kiam la pafiloj krakas
Levas alten sin la brust';
Brave l' apron ni atakas,
Estas laŭ ĉasista gust'.
Hola hoj —
Jen ĉasana ĝoj'.

Kiam ĝin ekflaras hundoj
En la nigra sang' sur ter',
Speguliĝas en la vundoj
Lastradio de l' vesper'.
Hola hoj —
Ĉasknabega ĝoj'.

Kiam laŭ ĉasista moro
Marŝas hejmen ni post fin',
Tiras nokte nin la koro
Al kaban' de l' amatin'.
Hola hoj —
Fianĉina ĝoj'.
(Ĉiuj for.)

DEKTRIA SCENO

Valentin (*kiu estis kaŝita en arbeto, elvenas*).

VALENTIN. Pro mi vi ĉasu plue, kiel longe vi volas.
Mi ne lasos min trakti tiel laŭapre. Mi mortpafus vin
ĉiujn, vi malbeninduloj, se mi nur havus ĉanon sur mia
pafilo. Mi tute ne povas kompreni, kian plezuron la
nobelaj homoj ĉiam havas per ĉi tiu malbeninda ĉasado.

KANTO

Kiel la riĉuloj pro
Ĉaso mem sin tedas do!
Je turment' al hom' kaj bestoj
Ili ĉasas eĉ dum festoj.
Mi ĝin tute ne divenas
Kaj la emon ne komprenas,
Al rampad' tra marĉ' kaj grotoj
Kaj flarad' laŭ juftaj botoj.
Estas do en ĉiu kaz'
La plej stulta far' la ĉas'.

Je la tria laŭ sekund'
Estas hor' por hom' kaj hund';
Ĉiuj venas kun pafilo,
Ĝin purigas ĝis la brilo;
Poste ili kuras veton,
Ne manĝinte eĉ peceton,
Tutajn tagojn tra l' arbaro;
Jen amuzo laŭ deklaro!
Estas, ho, min gardu Di',
Tio vera ĉasmani'.

Do mi lasas tion, ĉar
Min fitraktas la bubar':
Kiam ili min puŝtrafis,
Mi min preskaŭ mem mortpafis;
Se trans mil radikoj salte
Ili pelas min senhalte
Kaj je l' naz' min teren ĵetas,
Tiam ĉiuj ektrumpetas.
Tio estas ĉas' laŭ nom',
Ho, ĉielon plendu hom'!

Laca kiel ĉaslepor'
Herbe sidas mi post hor'.
Kredas esti sola nur —
Venas apro kiel ur'.
Dum mi pri defend' decidas,
Dorse ursopar' insidas,
Krom ĉe flanko tigroparo
Kun alia fibestaro,
Kaj en mezo mi kun trem' —
Estas kontraŭ mia em'.

(Kuras for.)

Scenŝanĝo. Ravanta pejzaĝo, en malantaŭo klara lago, ĉirkaŭata de ĉarma montaro. Dekstre roko, super ĝi la enirejo al la groto de Cheristane, antaŭ kiu ŝi staras en la sama kostumo kiel pli frue, sed sen krono kaj rigardas en la malproksimon.

DEKKVARA SCENO

CHERISTANE. Nun baldaŭ li surgrimpos krutan la altaĵon kaj sendos dolĉan la rigardon al kaban' de Mina, kredante, ke ĝi protektinta estis ĉiam lian plejamatatan. Li ĝoju do la lastan fojon pri ekvido ŝia.

(Mallonga muziko. Ŝi ŝanĝiĝas je ĉarma vilaĝknabino, gracie vestita laŭ itala gusto kaj eniĝas la rokon, kiu fariĝas serena kabano, ĉirkaŭvolvita de vinberujoj kaj floroj. Rapide kaj surprize ŝi paŝas al la pordo. Samtempe la kulisoj aliĝas je orientaj altaj floroj kaj orborderitaj palmoj, kiuj atingas la mezon de la scenejo. Enpense ŝi sidigas sin en la antaŭo sur florkovritan herbobenkon.)

Li sin averti rajtas sole,
Pri si decidi propravole,
Kaj ĉar la sort' ne agos laŭ savonto,
Li mem sin savu de la honto.
Ho, malserena sortdecido,
Flugilojn pruntas ĝi al ido
Rabitajn al anĝelo.

DEKKVINA SCENO

La antaŭa. Flottwell.

FLOTTWELL. Serenan tagon, korknabino, ne ĉagrenu, ke mi mem malfruas tiom, ĉar sopiro mia longe estas jam ĉe vi. Sed diru, kion vi do havas? Vi malĝojas! Ĉu vin iu suferigis? Ĉu ĵaluzo vin turmentas? Ĉu vi malsana aŭ malgaja estas? Diru! Aŭ ĉu ĉagreni vi min volas?

CHERISTANE *(ekstaras emociita)*. Ho, Julius! ne, tion mi ne volas! *(ĉirkaŭvolvas lian kolon per siaj brakoj kaj metas sian kapon sur lian bruston)*.

FLOTTWELL. Do nur duone estas vi ĉi tiu, kiu foje min feliĉiganta estis tute, pli gaja la duono mankas, kaj nur la malserena kuŝas jen sur mia brusto. Venu, ke ni repaciĝu, kara id'. Vi ne konjektas, kio min gajigas tiel. Vi ne restadu plu ĉi tie en kabano via, jam morgaŭ vi min sekvi devos en kastelon mian, tro longe jam ornamas fianĉina krono viajn silkajn buklojn, ĝi eble povus velki eĉ sur via frunto. La mondo vin salutu kiel mian koredzinon. Ne plu rajtas vi rezisti nun.

CHERISTANE. Ho, ne pliigu suferadon mian! Ne tiru min sur tiun ĉi altaĵon, ĝi montras al mi paradizon ja por mi ne alpaŝeblan. Mi trompis vin, ne estas mi l' estaĵo, kiun vi en mi ankoraŭ ĉi-momente serĉas.

FLOTTWELL. Vi estu kiu ajn. Ne ĉesu nur la afableco esti. Tri jaroj pasis, kiam mi dum ĉas' ĝis tie ĉi erare venis, ekvidinte vin unuafoje. Fremdige via belegeco brilis en malalta tiu ĉi kabano, juvelo kvazaŭ en la man' de almozul'. Al mi vi koron vian donis, sed neniam rajtis mi esplori, de kiu lok' vi venis, kiu estas vi. Kaj vidu, obeema kiel infanet' mi estis; neniam aŭdis eĉ demandon vi krom tiu, ĉu vi amos min por ĉiam. Vi je eden' ĉi tiun regionon ŝanĝis, kaj plantis florojn, kiaj nur la sonĝojn de la hind' ornamas. Neniam mi demandis vin de kie vi ekhavis tian potencegon, al mi sufiĉis, ke por mi vi faris ĝin.

CHERISTANE. Dediĉis ilin mi al vi, sed vane ili floris. Animon vian ili estis altirontaj en sian odorantan sferon kaj instruontaj vin pri la valoro vera de l' feliĉo. Mi ne atingis ĝin. Tro arda estas via fantazio, tro avida. Vi volas nur, ke via viv' festeno estu briletanta kaj tiras tutan mondon eĉ al via ora tablo. Ho, ke ĝi foje vin per amo rekompencu!

FLOTTWELL. Ĝi faros ĝin, gajiĝu via sent', min sekvu tuj, solec' vin malsanigis.

CHERISTANE. Ho vane! tro malfrue! Min posedi vi ne povas plu, min ĉirkaŭprenas nun je lasta foj'!

FLOTTWELL (*furioze*). Ne devas esti. Kiu riskos rabi mian havon la plej karan?

CHERISTANE. La sorto!

FLOTTWELL. Ne kredu ĝin! Feliĉo mia estas tro kuraĝa. Ĝi sin ne lasas venki tre facile (*ĉirkaŭprenas ŝin*). El mia brako mi ne lasos vin, eĉ se vi malfidela estas, mi volas ami vin ĝis kiam vi al mi revenos.

(*Muziko. En tiu ĉi momento flugas ruĝa aglo kun ora krono trans la lagon.*)

CHERISTANE (*por si*). Ho, for de mi, jam sentas mi eksigon de l' potenco. Ĉu vidas vi la purpurruĝan aglon, kies plumkovritan kapon ora kron' ornamas?

FLOTTWELL. Ho, kion diras vi? Nenia bird' ĉi tie movas sin!

(*Muziko. Grupo de nebulaj figuroj, kies okuloj estas minace direktataj al Cheristane, flugas trans la lagon.*)

CHERISTANE. Nek la figurojn minacantajn, min memorigantaj pri hejmiro? Antaŭen iru nur, mi sekvos tuj (*postrigardadas rigide*).

FLOTTWELL. Infano kara, kiom grave malsaniĝis vi. Min diru, kiuj estas la figuroj, kaj kiu la kronita aglo?

CHERISTANE (*solene*). Ilmaha, la feinreĝino. (*Ŝi malleviĝas kaj klinas la kapon, poste daŭrigas.*) Sciu do: Neniun homestaĵon vi al via koro premis. Cheristane estas mia nomo! mi estas el la feogent' kaj mia hejm' la nuboj malproksimaj, kiuj en eternaj rondoj super Persujo kaj Arabujo ŝvebas.

FLOTTWELL. Ĉu amo krimo estas en la nuboj? Aŭ ĉu tie punas ĝin de l' sorto la malbeno? Tiam estus ja la ter' ĉielo kaj ekzil' la eterneco!

CHERISTANE. Ho min aŭskultu antaŭ la blasfemo! Trifoje estas jam sep jaroj, kiam venis mi al via stelo. Por

agi bonfareme sur la tero, sendis min la fereĝino. Ŝi premis perlokronon sur eterne junan mian kapon kun la diro: En ĉiu de ĉi tiuj perloj estas magiaĵo enfermita, kiun vi ekuzi povas kiel ajn. Eluzu ilin kun saĝec' por homa beno. Sed kiam vi la lastan perlon estos oferinta, jen finiĝos via regno, kaj vi revenos por akcepti punon aŭ premion antaŭ mia trono. Ho ve al vi, se vi malindojn feliĉigos kaj tiele malhavigos al la bezonantoj la trezoron karan. (*Paŭzo, dum kiu ŝi alrigardas melankolie kaj signife Julius-on.*) Ĉu mi ĝin faris, la estont' al mi ĝin montros. Ankoraŭ multajn perlojn estis mi havanta, kiam mi ekvidis la sepjaran Julius-on antaŭ la kastel' de lia patro. Vi estis ĉarma kiel la printemp' kaj mi l' okulon amekscitan ne kapablis turni for de vi. En ĉi moment' feliĉon vian mi interne ekdecidis kaj multajn perlojn prenis mi de mia kron' kaj ŝutis ilin super vian kaj de via patro kapojn; jen la deveno de l' riĉaĵo senmezura, kiun li akiris en mallonga tempo. Ho, ke neniam estus mi farinta ĝin! Li mortis, maldankem' ne ploris, vi tutsole; jen vi fariĝis estro de l' havaĵ', kaj mi nur nun ekkonis, ke ĉio, kion mi por via ben' intencis fari, pro via pasiemo foje malfeliĉo via iĝi povos. Al mia koro mi ne plu malcedi povis; mi gvidis vin ĉi tien kaj de tiu tempo mi en via am' feliĉon la plej grandan mian trovis. Nun jam la sonĝo pasis, miaj perloj estas malŝparitaj kaj la lastan mi hodiŭ eĉ por via ben' oferi devis. Mi iam ne konjektis, ke ĝi povus esti la simbolo de maldolĉaj larmoj.

FLOTTWELL. Ho, Cheristane! kion vi do faris? Mi ne lasos vin kaj ĵetos ĉion for, se restas vi ĉe mi, kaj se vi iros, prenu ankaŭ mian vivon.

CHERISTANE. Ho, laŭ monarĥ' vi estas malavara. Mondon vi fordoni povus por al iu kul' konservi la ekziston,

sed mi l' noblecon vian ne trouzi volas: nur unu jaron donu vi al mi el via vivo, nur unu jaron, kiun mi elektu kaj pri kiu vi neniam plu disponi rajtos.

FLOTTWELL. Ho prenu ĝin! forprenu ĉion! La plej feliĉan prenu, la unikan, ampleksantan tiun feliĉegon fian, kiun mi sen vi ankoraŭ ĝui povos.

CHERISTANE. Mi dankas vin, mi vin ne tro prirabos, kaj nun mi estas preta; forfalu vi terana neniaĵo! (*Muziko. Ŝi aliĝas je formo de ĉarma nimfo. Samtempe aliĝas la kabano je roko, ĉirkaŭplektita de floroj kaj ombrumita de palmoj, similaj al funebraj salikoj. En la roko estas engravurita la nomo „Cheristane“.*) Ĉi tiu roko nur mistera estu atestant', ke Cheristane iam amis sur la tero. (*Muziko. El la floroj leviĝas genioj kaj falas malĝoje al la piedoj de Cheristane.*) La sun' subiras, floroj klinas siajn kapojn kaj genioj miaj tutsilente ploras; ĉar ili devas lasi ja kun mi la belan teron (*melankolia muziko*).

FLOTTWELL (*emociite falas al ŝiaj piedoj*). Ho, Cheristane, mortigu min!

CHERISTANE. Mi dankas vin pro via dolĉa fido, mia teramiko. Ho, se porvian amon mian mi en ĉiujn homajn korojn verŝi povus, mi ege konsolita irus for de vi. Ne rajtas mi vin diri, kio min ĉagrenas, ne rajtas mi, estintan nian sorton ja malkaŝi, sed se vi la lingvon de la tondro kaj de la ventegmuĝad' komprenus, vi ekaŭdus kiel Cheristane pro vi plendas. (*Ŝi iras kun siaj genioj en la kulisojn. Muziko komenciĝas. Cheristane flugas sur rozvualoj, kiuj formas plenblovitajn valojn, ĉirkaŭita de geniogrupoj, malrapide el la kuliso trans la lagon, en kiu la grupo subite respiguliĝas. En tiu momento ŝi ankoraŭfoje melankolie rigardas al Flottwell kaj vokas*): Julius! Memoru min! (*Tiam ŝi rapide envolas sin per malhela*

vualo de sia kapo, kiun ŝi malĝoje klinas kaj subite aliĝas la rozkoloraj vualoj je funebraj krepoj, kaj la grupo de la genioj kvazaŭ persorĉe aperas nun pentrita en vespera lumo, la rozkolora ĉielo nubiĝas violkolore kaj nur el unu sennuba vakaĵo postbriletas ŝin ankoraŭ palaj steloj. Intertempe Cheristane ŝvebas en la kontraŭan kulison, Flottwell falas sur la rokon kaj krias.)

FLOTTWELL. Ho dio! lasu min seniĝi en doloro mia!

DUA AKTO

Mateno. En la fundo la fasado de la novkonstruita kastelo de Flottwell. Ĉe la bazo de la larĝaj ŝtupoj kondukantaj al la palaca portalo sidas almozulo. Eluzitaj vestaĵoj, sed ne ĉifonitaj. Migrulbastono. Lia hararo estas griza kaj profunda ĉagreno pentriĝas en liaj trajtoj. La matena suno prilumas lin. Flanke estas kradpordego, tra kiu oni vidas en la kastelĝardenon. En la malproksimo oni ekvidas la antaŭe loĝitan kastelon de Flottwell. La fenestroj de la nova kastelo estas malfermitaj, en la granda salonego brulas ankoraŭ lumoj. Flottwell kaj kelkaj gastoj apogas sin ĉe la fenestro.

ĤORO (*en la festĉambrego*)

Ekŝaŭmu la vino en glas' dum festen',
La dormo nun estas mizera stultaj'.
Kaj se tra fenestro rigardas maten',
Priridas trinkul' ĝin kun gaja vizaĝ'.
Ha! ha! ha! (*ridego.*)

ALMOZULO (*samtempe kun la ĥoro*)

Jen pet' de l' mizerulo sonas:
Ho, donu iom da paner';
En via mez' riĉeco tronas,
Min premas de la mank' mizer'.
(*La ridado respondas kvazaŭ lian kanton.*)

ĤORO

La zorgojn mallumajn forĵetu trans bord',
Nur al la stultulo ja mankas ĝojem';

En viv' nur gajulon favoras la sort',
Ĉar kiu ne ĝuas, malamas sin mem.
Ha! ha! ha!

ALMOZULO

Ho, ne plendigu min sen agoj,
Ne vantu tro pri via ben';
Mi same faris dum ortagoj,
Kaj nun min punas la ĉagren'.
(*Li klinas sian kapon.*)

UNUA SCENO

Valentin kaj Rosa (*venas el la ĝardeno*).

VALENTIN. Centfoje mi al vi jam diris, ke vi ne estu tiel malĝentilega kun la ĉambristo. Vi scias, kia malica homo li estas, fine li kalumnios nin ĉe nia sinjoro.

ROSA. Silentu kaj ne parolu, se vi nenion scias. Mi devas esti malĝentila, ĉar mi estas virta persono.

VALENTIN. Ho, tio ja ne estas konsekvenco. Laŭ tio la domservistoj ja devus esti la plej virtaj homoj en la mondo.

ROSA. Ĉu vi estas tiom naivega? Ĉu vi ne rimarkas, ke min la ĉambristo ŝtelsekvas ĉien, ke mi eĉ en la kuirejo ne havas trankvilon?

VALENTIN. Ja, kion li do volas de vi?

ROSA. Li volas igi min sia ĉambristino.

VALENTIN. Li restu en sia ĉambro, se li volas esti laŭorda ĉambristo. Kion li estu faranta en la kuirejo? Vi do ne aŭskultas lin?

ROSA. Vi ja ne volas, ke mi diru al li mian opinion.

VALENTIN. Sed jes! Tion mi ja ne sciis. Tio ne malutilas al li. Cetere, estas tre bele de vi, ke vi ĝin diras al mi.

ROSA. Nu, kial mi ne diru ĝin al vi? Mi lin ne volas; se li plaĉus al mi, tiam mi nenion dirus.

VALENTIN. Brava! Jen virtaj principoj. Sed la hipo-

krita ĉambristo tute ne volas foriĝi el mia kapo.

ROSA. Li estas ne plu tolerebla. Ĉion li volas direkti. Pri la plej stultaj aferoj li zorgas.

VALENTIN. Nun li eĉ vin postkuras.

ROSA. Ĉie li volas ĉeesti.

VALENTIN. Se oni nur povus paroli kun nia sinjora moŝto, sed tiu estas de kelka tempo senakordo kiel malnova fortepiano.

ROSA. Ĉar lia edziĝo ne efektiviĝos. La sinjoro prezidanto de Klugheim ne donas al li sian filinon. Li tute ne amas lin.

VALENTIN. Li ja venos hodiaŭ al la festeno, kial li do ne amus lin?

ROSA. Ja, se ĉiuj gehomoj amus sin reciproke, kiuj sidas kune ĉe unu tablo, tiam la tuta mondo konsistus el bonaj amikoj. Kiuj venas ĉi tien en nian domon, tiujn oni nomas tabloamikoj. Tiuj estas nur amikoj por la tablo kaj ne por tiu, kiu invitas ilin al la tablo.

VALENTIN. Kaj la sinjoro prezidanto?

ROSA. Ĉe tiu estas tute alia kazo, li estas honestulo, li havas tute alian ordon en sia domo ol nia sinjoro. Mi tie estas tre bone konata, ĉar la ĉambristino estas mia plej bona amikino.

VALENTIN. Mi ankaŭ. La veturigisto min treege ŝatas, kaj li gvidas la tutan domon.

ROSA. Mi aŭdas preskaŭ ĉiun vorton. La sinjoro prezidanto nur tial ne amas nian sinjoron, ĉar li tiom elspezegas, li timas, ke li pereos. La barono Flitterstein estas tute alia viro kaj preskaŭ tiel riĉa kiel nia sinjoro. Kun tiu la fraŭlina moŝto devas geedziĝi.

VALENTIN. Tio maldevas esti. Pli bonan ŝi tute ne povas ekhavi ol nian sinjoron. Li estas tiel bonfarema, tiel bona.

ROSA. Troa boneco estas ankaŭ malperfektaĵo. Mi estas multe tro bona al vi; kaj unuvorte, la sinjoro prezidanto ne permesos ĝin.

VALENTIN. Ŝi ja estas freneze enamiĝinta en li. Ŝi ne lasos lin.

ROSA. Ŝi devos. Pro tio jam okazis multaj scenoj. Ili ĉiam sekrete kunvenadas; la sinjoro prezidanto tute maldevas ĝin scii. Ke vi nur nenion diru al iu.

VALENTIN. Mi ja ne perfidos mian sinjoron. Sed kial li do invitas la baronon Flitterstein por hodiaŭ. Li ja estas sur la listo.

ROSA. Ĉar li devas. La sinjoro prezidanto ja ne estus veninta sen li. Tial jam hieraŭ estis granda tablo, ĉar hodiaŭ estas la naskiĝtago de fraŭlino Amalie. Sed hieraŭ ili ne venis. Do nia sinjora moŝto malesperiĝis kaj skribis longegan leteron al la prezidanto. La ĉambristo rajdis kun ĝi en la urbon, revenis tute varmegiĝinta kaj alportis la sciigon, ke ili aperos hodiaŭ; sed la barono venos kune.

VALENTIN. Tio do estas terura, kiel ili fitraktas la sinjoron. Se mi nur scius kion fari. Ĉu ĉi tia afero do tute ne estas purigebla?

ROSA. Purigu viajn vestojn kaj botojn kaj ne zorgu pri aferoj por vi ne konvenaj.

VALENTIN. Mi nur timas, se la barono foredzinigos ŝin al li, ke li faros al si ian malbonaĵon. Eble fine estos plej bone, ke mi mem prudente pri tio parolu kun sinjoro prezidanto.

ROSA. Vi? Nu, tio estos bela interparolo. Ne kuraĝu, tio ja estus ofendo por tia sinjoro.

VALENTIN. Ja, estas nur, ke oni ne faru al si poste riproĉojn, se hodiaŭ aŭ morgaŭ okazos tia malfeliĉo.

ROSA. Nu, iru nur, iru, vi naivega homo.

VALENTIN. Jes, oni ne povas esti sufiĉe singarda (*ambaŭ for*).

DUA SCENO

Flottwell kaj lia kastelano (*el la kastelo*).

FLOTTWELL. Nu, kiel staras la afer', maljuna kastelano mia? Ĉu estas ĉio kiel mi ordonis ĝin? Je bril' mi volas resti tute ne superigata, kaj por la ĝoj' de Amalie nenia eĉ ofer' por mi tro granda estas.

KASTELANO. Ho jes, ofer', sinjora moŝto. Ĉar la festen' hodiaŭ ripetiĝas eĉ pli brile, rezultigis do sufiĉe granda la kalkulo.

FLOTTWELL. Feliĉo estas do, ke vi ĝin ne bezonas pagi. La riĉa Flottwell ja ne ŝuldos eĉ heleron! Kaj la juvelo, kiun mendis mi? Ĉu juvelisto ĝin ankoraŭ ne alportis?

KASTELANO. Ankoraŭ mi nenion scias.

FLOTTWELL (*ekscitite*). Tuj sendu al la urb', plej urĝa estas temp', ĝi devus esti preta jam antaŭan la semajnon.

KASTELANO. Se via moŝto estus ĝin mendinta ĉe l' honesta viro, kiun mi al via moŝto rekomendis, vi ĝin havus jam, ĝi estus bele kaj malkare sukcesinta, sed ĉambristo via...

FLOTTWELL. Al mi pli bonan rekomend'is. Ĉu ne vere?

KASTELANO. Mi ne kredas.

FLOTTWELL. Vi pensu kiel ajn. Sed mi ne ŝatas, ke servistoj miaj min instru; tion ĉi memoru por estonto. Nun, la juvelisto (*deturnas sin de li*).

KASTELANO (*por si, ĉagrenite*). Ho, fideleco! Kia hund' mizera estas vi, ke maldankem' vin piedpremi rajtas (*for*).

TRIA SCENO

Flottwell. La almozulo.

FLOTTWELL. Malnova meblo el la postlasaj' de l' patro. Ĉi tiu viro estas ĉiam malkontenta kun ĉio, kion faras mi. Maljunaj homoj ĉiam estas strangaj. Mi estas tiom senhumora! Hodiaŭ estos tag' varmega, multon decidiga sur Flottwell-kastelo. Amalie perdi mi ne povas, nek ŝin vidi en la brako de alia, mi ĵuris ĝin al ŝi; kaj se mi ne sukcesos varbi ŝian patron, se li ne ĉesos foroferi sian idon al obstin' rigida, tiam firimedon mi ekuzi devus. Hieraŭ jam atendis mi leteron. Ho Di'!, se ŝi heziti povus! (*Ekvidas la almozulon, kiu enpenso skribas per sia bastono en la sablon.*) Kion, la almozulo faras tie? Mi lin rimarkis jam hodiaŭ de l' fenestro kaj lia kanto strange min kortuŝis. Min ŝajnas, ke mi estis ie jam vidinta lin, kaj ke li kvazaŭ volus kanti mortokanton nun al mia ĝojo. Mirigas min, ke mia servistar' lin tie lasas sidi. Vi kion skribas per almozbastono via en la sablon?

ALMOZULO. La sumon de la oro, iam poseditan.

FLOTTWELL. Ĉu vi do riĉa estis?

ALMOZULO (*sopirante*). Jes!

FLOTTWELL. Ke pardon vi priploras, montras larmo en okulo via.

ALMOZULO. La perditaj' spegulas sin en mia larmo. La palaco.

FLOTTWELL (*konsternite*). Ho, kio estis vi kaj kiu via nom'?

ALMOZULO. La lasta task' de mia vivo estas, ambaŭ malmemori, la rimedo sola, kiu min de l' malespero savi povas.

FLOTTWELL. Strange. (*Ĵetas ormoneron en lian ĉapelon*) Jen prenu ĉi orpecon. (*Volas iri al ĝardeno*).

ALMOZULO (*eksaltas kaj falegas al liaj piedoj, sed ne tuŝante lin*). Ho, via moŝt', donacu min pli multe, donu al mi sumon decan al noblec' mondfama via.

FLOTTWELL. Ĉu havas vi edzinon? Ĉu tiom da infanoj?

ALMOZULO. Mi estas sola, nur ĉagren' min akompanas.

FLOTTWELL (*jetas al li ankoraŭ orpecon*). Satigu vin kaj ĝin forpelu.

ALMOZULO. Ne tiel estas ĝi facile forpelebla kiel la feliĉ'.

FLOTTWELL. Ĝi estas nur efik', forigu do la kaŭzon.

ALMOZULO. Ĉu vi kapablas igi for de via am' la kaŭzon?

FLOTTWELL. De kiu vi eksciis, ke mi amas?

ALMOZULO. Ĉu iu alte pensas, ne amante?

FLOTTWELL. Ĉu vi min flati volas, almozulo? Hontu!

ALMOZULO. Ĉu nur riĉuloj rajtas flati?

FLOTTWELL. Mi ne demandis vin por aŭdi mokon de ĉagreno via. Kontenta povas esti vi pri la donac'. (*Flanken*) Timigas min de tiu vir' proksimo (*volas iri*).

ALMOZULO (*petegante*). Ne, via moŝto, mi ne estas, mi ne devas esti ĝi! Kompatu pro mizero min, ĝi estas nek avid', nek ruzo almozula. Min pridonacu riĉe kaj mi estos danka.

FLOTTWELL. Do diru, kia estis via stat' iama.

ALMOZULO. Mi ĝin ne diros. De l' mizer' la rust' korodis mian ŝildon. Kiu nun demandas, kia ĝin simbol' ornamis foje? Mi scias ĝin, ke multon mi postulas kaj pretendo mia povas suspektigi min je frenezeco. Sed ne atakas ĝi spiriton mian; kaj estu kiom ajn mi riĉe donacota, tamen foje mi fordonis multe pli grandegajn sumojn.

FLOTTWELL. Vi hontu do, pro mono tiel plendi, la plej malalta estas ĝi, pri kiu indas plori. Sufiĉas por hodiaŭ. Alian fojon ree venu.

ALMOZULO. Mi estas almozulo kaj obeas. (*Riverencas kaj malrapide foriras.*)

KVARA SCENO

Flottwell. Servisto.

SERVISTO. Letero, via moŝto! (*transdonas ĝin kaj ree foriras*).

FLOTTWELL (*vidas la surskribon*). De Amalie, de ĉiela mia Amalie (*legas*).

Karega Julius!

„Pardonu, ke hieraŭ mi al vi ne skribis, sed la granda lukt' en mia koro devis antaŭ ĉio esti decidita. Sed nun promesas mi al vi, neniam vin forlasi. Mi ne konsentos kun la severaj postuloj de mia patro, kaj se nenia peto povos tian, krom tiel noblan, koron plimoligi, do okazu, kion ni decidis.“ —

Amalie mia! Ho, ke mi povus ĉirkaŭpreni do la tutan mondon! He vi! (*La servisto venas.*) Revoku l' almozulon, kiu ĵus sidiĝis jen en tiu laŭbo. (*Montras en la kulison.*)

SERVISTO. Mi ne vidas almozulon, via moŝto.

FLOTTWELL. Ĉu vi blindiĝis? Iru for!

SERVISTO (*for, vokas*). He, paĉjo, venu!

ALMOZULO. Kion vi ordonas, via moŝto?

FLOTTWELL. Ĝojigan jen sciigon mi ricevis, kaj Flottwell ne povas ĝoji sola. Pardonu, mi vin traktis tro avare. Ĉi tiun sakon prenu kaj ĉi tiun (*jetas ilin en lian ĉapelon*). Prenu ĉion, kion mi kunhavas. Sableron nur valoras, kion mi donaci povas, kontraŭ la bonŝanco senmezura, kiun tiu ĉi letero al mi portis. (*For, al la ĝardeno.*)

ALMOZULO (*sola*). Kompato en la homa brusto. Kiel malsanema ofte estas vi, naskinta kvazaŭ estus vin infan' ploranta. Entuziasmo kreas ĉion noblan tuj, ĝi per la oro de la malŝparul' plenigas la ĉapelon almozulan (*for*).

KVINA SCENO

DUMONT (*elegante vestita venas el la kastelo*). Ho, kiel gaja estas mi! Jam tutan jaron mi ne vidis tiun ĉi pejzaĝon. Tro longa estis min la nokto. Mi metis kvindek dukatojn sur mian karton, ekkantis najtingal', mi kuris for, la mono restis, kaj estis *perdu*. Sed kio estas bril' dukata kontraŭ matenruĝ'! Belega tag'! Hodiaŭ la natur' ekspozicias ĉiujn siajn ravojn. (*Rigardas tra la lorneto en la scenejon.*) Jen venas maljuna virin'!

SESA SCENO

La antaŭa. Maljuna, sendenta avineto, ĉifonvestita, kun granda fasko da sekbranĉoj surdorse.

DUMONT. *Bon jour madame!* Kien vi portas la lignaĵon!

VIRINO. Hejmen! Jen en la montaron, al Bluncendorf.

DUMONT. Blonsendorf? Ho bela nom'! Ĉu vi volonte loĝas en montaro?

VIRINO. Ho jes; ĝi estas bela, se nur la montoj ne ekzistus. Oni grimpas ilin tiel pene.

DUMONT. Jen figuroj vivigantaj la pejzaĝon. Ho, la virino plaĉas al mi tre.

VIRINO (*flanken*). Mi plaĉas lin, li diras, foje mi pli bone estus lin plaĉinta.

DUMONT. Ŝi estas tiel pentrinde ĉifonita. Mi ne povas ŝin sufiĉe priobservi. (*Li rigardas tra unu vitro de la lorneto kaj premfermas la maldekstran okulon.*)

VIRINO. Li efektive min admiras; sed nur per unu okulo, la alian li premfermas!

DUMONT. Ĉu estas vi edziniĝinta?

VIRINO. Jam pli ol tridek jarojn.

DUMONT. Kaj ĉu la edzo vin ankoraŭ zorgas?

VIRINO. Ho, jes. Li min ankoraŭ batas.

DUMONT. Li batas vin? Ho, tio ne estas bela de li.

VIRINO. Ho, jes, ĝi estas bela de li. Ĝi estas laŭ montarkutimo nia. Malbona dommastrum' sen interbato.

DUMONT. Naivaj ĝojoj de l' natur'. De tiu flank' la bildo eĉ pli bele sin prezentos. Vin starigu tien, mi vin volas vidi tute de antaŭe.

VIRINO. Ho, ĉesu! Kion vi je mi nun vidas? Se vi estus min vidinta antaŭ kvardek jaroj. Nun mi jam estas nur maljunulino.

DUMONT. Jen, via do beleco! Perfekte estas vi maljuna. *Au contraire*, vi devus havi eĉ pli da sulkoj.

VIRINO. Pro kio do. Por mia edzo jam ĉi tiuj estas tro.

DUMONT. Vi estas vere el la lernejo nederlanda.

VIRINO. Ne eble, mi neniam iris en lernejon.

DUMONT. Mi havas hejme tutan kolektaĵon da tiaj maljunulinoj.

VIRINO. Jen, bonege. Li kolektas la maljunajn virinojn, kaj aliaj ĝojus, povante liberigi sin de ili.

DUMONT (*elpoŝigas rondforman, malgrandan, nigran spegulon, forturnas sin kaj speguligas en ĝi la pejzaĝon*). *O quel kontraste*. Kastel!, arbar', virin', la bovoj sur la kamp'! O natur'! Vi estas granda senfiniĝ'.

VIRINO. Tiu homo estas certe freneza. Nun li rigardas spegulon kaj vidas bovojn en ĝi.

DUMONT. Jen havu dukaton. Nun mi jam vidis vin sufiĉe (*donas al ĝi orpecon*).

VIRINO (*furioza pro ĝojo*). Ho spektaklo, ho spektaklo! Nun li donas al mi eĉ dukaton! Via moŝto, tio ja estas tro multe, mi tute ne kuraĝas preni ĝin. Pro kio do? min diru nur.

DUMONT. Aspekto via multe plezurigis min.

VIRINO. Ne, en mia vivo mi ne estus ĝin kredinta, ke mi lasus vidi min en mia maljunaĝ' por mono. Milfojan dankon (*kisas lian manon*). Via moŝto min pardonu. — Mi vin petas — ĉu mi efektive plaĉis vin?

DUMONT (*devas ridi*). Ho, vi min plaĉas eksterordinare. VIRINO (*honteme*). Ho, ĉesu, vi povus ja maljunan inon tute frenezigi. Ne, se mia edzo ĝin ekscios, li mortbatos min hodiaŭ pro ĝojego. Mi diras ja, se oni foje estis vere bela kaj maljuniĝu kiom ajn, ereto tamen ĉiam restas (*iretas for*).

DUMONT (*postrigardas ŝin*). Ho, kiom ŝanceliĝas ŝi, kiel maljuna cigno! Mi estas tiom ekscitita, ke ĉiu aĵo plaĉas min.

SEPA SCENO

La antaŭa. Rosa (*volas iri kun kafvazaro al la ĝardeno*).

DUMONT. *A ma belle Rosa!*

ROSA. Bonan tagon, via moŝto!

DUMONT (*retenas ŝin*). Ho, tiel facile vi ne liberiĝos de mi. La maljun' estas *charmant*, sed la jun' min tamen plaĉas eĉ pli bone. Tiu estas la pentraĵo por okul', ĉi tiu la pentraĵo por la kor'.

ROSA. Sinjoro kavaliro, mi ne havas tempon, la sinjora moŝto deziras trinki kafon.

DUMONT (*karese ĉirkaŭpremas ŝin*). Bela Roz'!

ROSA (*fortordinte ŝin*). Kia bela roz', kion mi havas de via belrozeco, mi devas iri en la ĝardenon.

DUMONT. Ho! vi maldevas, mi estas *enchanté*. Ho tiuj vangoj, tiuj okuloj, tiu rigardado. Ho, naturo, kion vi ĉi tie kreis! Mi ne povas min reteni, mi devas ŝin *embrasser*.

ROSA. Sinjoro *chevalier*, min lasu aŭ mi krios.

DUMONT. Sigeli volas mi la buŝon. (*Li volas ŝin kisi, ŝi krias kaj faligas la kafvazaron.*)

OKA SCENO

La antaŭaj. Flottwell kaj Wolf (*el la ĝardeno*).

FLOTTWELL. He, he! Sinjoro *chevalier*, kion vi ĉi tie faras?

DUMONT. Mi admiras la naturon.

FLOTTWELL. Brave! Vi etendas vian amon por naturo al la plej altaj kaj la plej vulgaraj aĵoj.

WOLF. Belaj aŭ malbelaj, al sinjoro *chevalier* tutegale tio estas.

DUMONT. Kion vi parolas pri malbela, la natur' plej alta estas poezi' kaj poezi' neniam povas esti ĉu vulgara ĉu malbela. Pro ĝia bel' mi volas min dueli kaj batigi; kaj se mi falos do la mond' sur mian tombon skribos:

Jen dormas sub ĉi tiu ŝton'

Tutsole *chevalier Dumont*.

Sur ter' li amindumis nur

Kun ĉieleca la natur'!

Nun li ripozas post la fin'

Ĉe l' kor' de sia amatin',

Kaj en ĉielo oni ja

Akceptos lin *naturellement*.

(*Foriras fiere en la kastelon.*)

ROSA (*kolektas la vazaron*). Abomene! Al ĉies trudo oni estas elmetita en ĉiu tiu domo.

FLOTTWELL. Evitu la gastojn, kiam ili trinkis ĉampanon. Mi estas tre malkontenta kun vi; sinjoro Wolf ankaŭ plendis, ke vi estas tre malĝentila kun li kaj pri mi parolas sen estimo.

ROSA. Ĉu lia moŝto sinjoro ĉambristo? Ho, nun mi devas paroli.

WOLF (*subtile*). Ne, vine devas, videvas plenumivianservon.

ROSA. Mi estas en servo de la sinjora moŝto kaj ne de certaj homoj.

WOLF. Silentu nur —

ROSA. Ne, mi nenion volas prisilenti, ĉio devas elen.

WOLF. Kia malico!

ROSA. Ĉu via moŝto scias, kion diris la ĉambristo?

FLOTTWELL. Kion li diris?

NAŬA SCENO

La antaŭaj. Valentin (*rapide, tuj poste la juvelisto*).

VALENTIN. La juvelisto estas tie ĉi.

FLOTTWELL. Ho brave! Nur rapide en mian ĉambron (*rapide foriras*).

(*La juvelisto eniras de la flanko kaj Wolf kondukas lin en la kastelon, antaŭe li diras al Rosa.*)

WOLF. Ni interparolos, fraŭlino (*for*).

DEKA SCENO

Valentin kaj Rosa.

ROSA. Jen mi staras nun!

VALENTIN. Jen ŝi staras nun!

ROSA (*staras kvazaŭ ŝtoniĝinta*). Al kiu mi nun sentigu mian koleron?

VALENTIN. Atendu, mi prizorgos iun (*volas for*).

ROSA. Vi restos! Je vi mi venĝos, vi fatala homo (*alpaŝas lin*).

VALENTIN. Je mi? Ĉi tio al mi mankus. Mi ja nenion diris krom: La juvelisto estas tie ĉi!

ROSA. Silentu! aŭ — (*eksvingas la manon kaj volas doni al li vangfrapon, sed subite svenetas*). Ho, ve! min trafas la apopleksio!

VALENTIN. Jen bonŝanco, alie estus min trafinta io.

ROSA (*eksaltas*). La juvelisto iru tien, kie kreskas pipro.

VALENTIN. Diru tion mem al li, mi ne scias kie ĝi kreskas.

ROSA. Silentu! Mi ne scias, kiel reĝustigi min!

VALENTIN. Nu insultadu nur, la juvelisto vin ĝustigos jam.

ROSA. Tuj iru for! (*faras, kvazaŭ ŝi volus elgrati liajn okulojn*) vi kulpas ja pri ĉio.

VALENTIN. Mi ja nenion diris krom: La juvelisto estas tie ĉi.

ROSA. Nu ĝuste tio estas via krimo, nenion tute estus vi devinta diri ekvidinte, ke mia virto staras sur la punkto defendi siajn rajtojn (*for*).

VALENTIN. Terure! Do, se iu havus kiom ajn eĉ da malvirtoj, neniam ili povus kaŭzi tiom da ĉagreno kiel tiu ŝia malfeliĉa virto.

DEKUNUA SCENO

Mallonga kabineto de Flottwell. Tra la fenestro oni vidas kolonaron kaj tra ĉi tiu la pejzaĝon.

Flottwell kaj juvelisto (*eniras*).

FLOTTWELL (*tre ĝentile*). Kie vi havas la juvelon? Donu!

Mi jam ĝojas kiel infaneto! Kiom eĉ ĝojegos Amalie.

JUVELISTO. Jen ĝi estas.

FLOTTWELL (*pririgardas ĝin kaj serioziĝas*). Ĉielo, kion vi do faris?

JUVELISTO. Kial do?

FLOTTWELL. Tia mi ne povas uzi ĝin.

JUVELISTO. Ĝi estas laŭ via instrukcio, sinjora moŝto.

FLOTTWELL (*ekscitiĝas ĉiam pli*). Ne, ne! Ĉi tio ĝi ne estas.

JUVELISTO. Precize laŭ la desegnaĵo, mi certigas vin.

FLOTTWELL. Ne, ne ne, ne! (*Senhumore*) Ĝi estas tute malmoderna kaj ankaŭ ne la ŝtonoj estas tiuj, kiujn mi elektis.

JUVELISTO. Sinjoro de Flottwell! Ĉi tio tuŝas ja honoron mian.

FLOTTWELL. Sed ankaŭ mian, mi ne povas uzi la juvelon.

JUVELISTO. Mi ne reprenos ĝin.

FLOTTWELL. Vi devas tion!

JUVELISTO. Mi aliigos ĝin.

FLOTTWELL. Jam tro malfrue. Ĝi ja estas donacaĵo por la hodiaŭa festo. Vi neniigis tutan mian ĝojon per via mallerteco.

JUVELISTO (*iom ofendite*). Sinjoro de Flottwell — (*rekon-sciigas*) Mi vin certigas, estas nur kaprico.

FLOTTWELL. Ho, ne certigu min, malbona estas la juvelo!

JUVELISTO. Nur ĝin rigardu.

FLOTTWELL. Ne, ne! Al mi tiele ĝi malplaĉas, ke mi ĝin tra l' fenestro ĵeti povus.

JUVELISTO. Mi pensas: tion certe vi evitos.

FLOTTWELL. Mi ne evitos tion, jen ĝi kuŝas (*ĵetas la juvelon el la fenestro*).

JUVELISTO (*ektimigite*). Cielo! la juvelo valoras ja du mil talerojn.

FLOTTWELL (*fiere*). Ĉu timas vi? Mizera mon'! Vi ĝin ricevos tuj, atendu. (*Rapidas en la ĉambreton*.)

JUVELISTO. Jen frenezaĵo, kian mi ankoraŭ ne ĝis-vivis. Mi iros serĉi la juvelon (*kuras for*).

(*Oni vidas la almozulon, kiu, levinte la juvelon ĝin tenas kontraŭ la ĉielo kaj kantas*.)

ALMOZULO. Al vi, bonuloj, estu danko,
Vi tiom pridonacis min.
Premegas mian koron manko,
Ĉar propra kulpo kaŭzis ĝin.

(*Li malproksimiĝas tra la kolonoj kaj ripetas ankoraŭ la lastajn vortojn en la malproksimo*.)

JUVELISTO (*revenas konsternita*). For estas la juvelo, mi ĝin ne trovis.

(*Flottwell el la kabineto. Li konsciigis kaj lia konduto montras, ke li pripentas sian ekscitemon kaj hontas pro ĝi. Li portas rulajon da oro*.)

FLOTTWELL (*noble kaj afable*). Jen via mono, ho sinjoro.

JUVELISTO (*gentile*). Sinjor' de Flottwell, mi bedaŭras. —

FLOTTWELL. Nenion vi bedaŭru. Mi devas mem bedaŭri mian ne pripardonindan ekscitemon. Mia sango min incitas. Mi devas baldaŭ ellasigi iom.

JUVELISTO. Favana vorto ĉion rebonigas.

FLOTTWELL (*premas lian manon*). Ĉu ne, vi ne koleros pro ĉi tio, koramiko — kaj vi forgesos ĝin — kaj eĉ ne plu pri ĝi parolos? Mi ne deziras, ke pri tio ie vi rakontu.

JUVELISTO. Honorparol' je ĝi —

FLOTTWELL. Jes, jes, mi scias, tute fidi mi vin povas. Eĉ baldaŭ mi reuzos vian arton kaj certe baldaŭ ion mendos. Tre baldaŭ, kaj adiaŭ nun amiko, kaj ne plu ĉagreniĝu.

JUVELISTO (*kun profunda riverenco*). Kiel povus mi, mi estas tiom kortuŝita. (*Forirante*) Se li nur baldaŭ efektive do farigus ion (*for*).

DEKDUA SCENO

FLOTTWELL (*sole*). Emociega tag'! Ke estu ĝi jam forpasinta (*ĵetiĝas sur seĝon rigardante rigide antaŭ sin. En malproksimo sonas la lastaj vortoj de la almozula kanto*).

Premegas mian koron manko,
Ĉar propra kulpo kaŭzis ĝin.

FLOTTWELL (*eksaltas*). Ho, kia kant'!

DEKTRIA SCENO

La antaŭaj. Wolf (*eniras*).

WOLF. Ho, kara moŝtsinjoro! La juvelisto tre malbone faris sian aĵon, mi ĵus riproĉis lin, sed nun imagu! Mal-aperis la juvelo kaj neniun volas esti ĝin trovinta.

FLOTTWELL. Mi tre bedaŭras, ĉar ĝi multe kostis.

WOLF. Ĝi devus esti trovota, mi ĝin vidis flugi el fenestro. Neniun vidis mi proksime, krom la ĉambristino Rosa. Mi kuris tuj malsupren, sed ĝi estis for, kaj kiam mi demandis ŝin, do ŝi — laŭ dir' — nenion vidis.

FLOTTWELL. Mi tamen tion pri ŝi ne kredas.

WOLF. Ni la aferon devas esplorigi.

FLOTTWELL. Nur ne hodiaŭ, pro skandalo; kaj kiu scias, ĉu tio estas vera.

WOLF. Ho, certe, mi tion preskaŭ vidis.

FLOTTWELL. Se estas vere, tiam ŝi devas for; mi ne deziras kroman punon.

WOLF. Ho, kiel nin ĉielo ofte malfavoras. Al fest' jam ĉio estas preta, la gastoj kunvenintaj en ĝardensalono. La belelvidon al la valo mi kovrigis per kurtenoj. Ni atendos ĝis la sun' subiros, kaj kiam tuje estos ĝi pasinta, imponan havos ni aspekton.

FLOTTWELL. Ĉu la dancistoj estas pretaj?

WOLF. Jes. La sinjoro prezidanto ankaŭ jam ĉeestas.

FLOTTWELL. Amalie estas jam ĉi tie, kial vi nur nun ĝin diras?

WOLF. Mi tuj ŝin gvidis en la bluan ĉambron, sed la barono iris al la ĝardeno.

FLOTTWELL (*eksalte*). Ĉu la barono? Honte! ke mi konkuranton mian kiel gaston devas peti. Kaj kion mi prezentu al Amalie, la juvelo estas for.

WOLF. Donacu do al ŝi la multekostan vazon, kiun vi ĵus estis aĉetinta, jen donaco inda je milionulo.

FLOTTWELL. Ĝi estas multvalora, sed pro tio taŭga, la prezidanto estas artamiko, eble ĝi emigos lin.

WOLF (*por si*). Ho, vi eraras.

FLOTTWELL. Ornamu ĝin per floroj kaj prizorgu ĉion. Nun al ŝi, al ŝi — (*ambaŭ for*).

DEKKVARA SCENO

Eleganta salono. La prezidanto de Klugheim kaj Amalie.

KLUGHEIM. Ho, trankviliĝu do filino mia kaj ne pentigu min, ke tiel estis mi malforta, por cedi viajn petojn.

AMALIE (*luktante kun sia doloro*). Jes, patro mia, mi trankvila estas.

KLUGHEIM. Nur nun mi vidas, ke vi trompis min per eldeviga ĝojo; vi ne plu devus esti revidinta lin.

AMALIE. Kontraŭe patro, tio fortigos min por longa tempo, eltoleri la suferojn.

KLUGHEIM. Nur ne forgesu, ke ni estas en la societo, kaj ke vin la barono amas pli ol sian vivon.

DEKKVINA SCENO

La antaŭaj. Julius Flottwell.

FLOTTWELL (*kore*). Tre estimata mia sinjoro prezidanto! Plej alta la favoro, kiun mi de la feliĉ' atingi povis, estas la honoro, vin saluti en kastelo mia. Fraŭlino mia ĉarma! Neniam Flottwell ĝin forgesos, ke via nobla koro ne rifuzis, esti la reĝino de malgranda lia festo.

AMALIE (*kliniĝante*). Sinjoro de Flottwell —

KLUGHEIM. Sufiĉe da ceremonioj, amiko venas al amiko.

FLOTTWELL. Ĉu estas fakte tiel, sinjoro prezidanto?

KLUGHEIM. Ĉu vi pridubas tion? Tiam estus ja duone nur.

FLOTTWELL. Ho, kiom mi sopiras, ke ĝi tute estus tiel, ke vi —

KLUGHEIM (*subtile*). Sinjor' de Flottwell, ĉiu kiu ajn alludo pri iamaj cirkonstancoj estas kontraŭ la kondiĉo, laŭ kiu mi akceptis vian hodiaŭan alinviton.

AMALIE. Plej bona patro, lasu vin kortuŝi, se la vivo de infano via por vi iom da valoro havas.

KLUGHEIM. Ho, kio do okazas? Ĉu komploto kontraŭ mi estiĝas? Ĉu oni min invitis tien ĉi por renovigi la aferon, kiun mi finita konsideris?

FLOTTWELL. Sinjoro prezidanto, vi eraras! Fraŭlin' filino via. —

KLUGHEIM. Estas revulino! Ŝian vivfeliĉon Di' al mi konfidis, kaj neniŭ rajtas min riproĉi, se mi ne kondukas ŝin al brak' de ŝia malfeliĉo.

FLOTTWELL. Sinjoro prezidanto, vi min tre malkonas.

KLUGHEIM. Mi vidas klare, kion nur estont' al vi malkovras.

FLOTTWELL. Min kalumniis iu.

KLUGHEIM. Neniŭ.

FLOTTWELL. La insidul', barono Flitterstein.

DEKSESA SCENO

La antaŭaj. Barono Flitterstein (*kun mirego, sed ne ofendante la konvencion*).

FLITTERSTEIN. Ĉu pri mi ĉi tie estas parolate? (*Konsciigas kaj ridetas subtile*.) Vi silentas, do pri parenco mia? Tion mi nur volis scii kiel nobelulo.

FLOTTWELL (*embarasite*). Sinjor' baron', mi ĝojas.

FLITTERSTEIN (*rapide*). Mi komprenas, mia amikeco al sinjoro prezidanto —

FLOTTWELL. Estas la kialo, ke vi honoras min nun per vizito via. Mi pri ĉio estas informita. (*Post paŭzo, dum kiu vidiĝas ĝenerala embaraso*.) Ĉu plaĉas iri nun al societo?

FLITTERSTEIN. Laŭ bontrovo!

FLOTTWELL (*prezentas al Amalie ŝian brakon*). Fraŭlino! (*forkondukas ŝin*.)

FLITTERSTEIN (*sekvas*).

KLUGHEIM. Mi timas, ke ni la gajemon vokis kaj al ĉagren' malfermas niajn pordojn (*for*).

DEKSEPA SCENO

Belege per oro kaj floroj ornamita ĝardenĉambrego. La malantaŭa muro gustoplene ornamita. Ĉiuj gastoj estas kunigintaj.

Dumont, Walter, Wolf. Sinjoroj kaj sinjorinoj. Flottwell, Amalie, Klugheim eniras dum la horkanto kaj sidiĝas.

ĤORO

Gastoj vagas la ĝojamaj

Tra la haloj riĉornamaj,

Unuiĝas ĝoj' kaj belo

Nepre en Flottwell-kastelo.

Kaj en liaj ejoj nur

Regas granda korplezur'.

(*Dancistoj kaj dancistinoj en hispana kostumo prezentas ĉarman dancon kaj en la fino formiĝas impona grupo, ĉe kiu infanoj en la sama kostumo metas la per floroj ornamitan vazon sur rondan soklon en la mezo de la scenejo*.)

FLOTTWELL (*post la danco por si*). Kion do faris Wolf, nun ŝi ne devis ĝin ricevi.

KLUGHEIM. Vidu do barono, jen la fama vazo, kiun franco vendproponis al ministro por dudek mil frankoj.

FLITTERSTEIN. Vere, jes, ĝi estas tiu.

KELKAJ GASTOJ (*observas ĝin*). Fakte bela!

WALTER. Rigardu jen, *chevalier*; la vazo el Paris.

DUMONT (*dorsapogite en seĝo, ne rigardante*). O *charmant*! Ĝi estas nepre eksterordinara.

WALTER. Ho, vi ja tute ne rigardis ĝin.

DUMONT. Mi tute ne bezonas vidi ĝin, mi nur bezonas aŭdi: de Paris, alia ĝi ne povas esti ja ol *magnifique*.

FLITTERSTEIN. Vi vere estas enviinda pro tiu ĉi artaĵ', sinjoro de Flottwell.

FLOTTWELL (*por si*). Nun mi ne povas plu reiri (*laŭte*). Ĝi ne plu estas mia posedaĵo. Donaco sensignifa, kiun mi al la reĝino de la fest' dediĉas.

AMALIE (*ĝojigita*). Ho, patro, kiel min ĝojigas tio!

KLUGHEIM (*severe*). Ne, ne, infano mia! pardonu min, sinjoro de Flottwell, mi tion ne permesas. Tro multekosta estas la donaco, por akcepti ĝin.

FLITTERSTEIN. Jes, jes, tro multekosta.

FLOTTWELL. Ne, tio ĝi ne estas ho sinjor' baron', la mondo eĉ ne ĝojas pri juvel' tro multekosta, por donace esti dediĉata al fraŭlin' ĉi tiu.

KLUGHEIM. Mi eĉ ne scias, kiel nin koncernas tiu ĉi honoro.

FLITTERSTEIN (*duonlaŭte*). Kiu pli ofendas ol —

FLOTTWELL (*aŭdinte ĝin*). Ĉu ofendas?

FLITTERSTEIN. Mi ne reprenas ĝin.

FLOTTWELL (*obstine*). Kun kia rajt', sinjor' baron', vi je l' honoro de l' fraŭlino pledas?

KLUGHEIM. Li nur parolas en la nomo de estonta sia fianĉino.

KELKAJ GASTOJ. Ho, ni gratulas.

FLOTTWELL (*neniigite*). Jen, mi nenion estas plu dironta.

KLUGHEIM. Reprenu tiun vazon, tiel pridonacas reĝo, ne nobelo.

FLOTTWELL (*fiere*). Mi tiel pridonacas! Mi estas reĝo de propraĵo mia. Tiu ĉi artaĵ' plej grandan sian valoregon pruntis de l' ideo, ke ĉi tiu bela mano ĝin ektuŝos kiel posedaĵon ĝojigantan. Ne povas esti. Mi ne ŝatas ĝin.

Wolf prenus ĝin. Ĉi tiun vazon mi donacas al ĉambristo mia.

WOLF (*riverencas duonembarase. La vazo estas forportata*).

FLITTERSTEIN. Kia frenezaĵo!

KLUGHEIM. Ne kredeble!

DUMONT. La viro estas tutfreneza.

AMALIE. Kiel li povas tiom ne sinregi.

LA GASTOJ (*aplaŭdas*). Brave! Tiel venĝas sin milionulo.

FLOTTWELL. Ĉi tio ne difektu nian ĝojon. Ĉar la franca arto tre malbone venkis, do mi prezentos al okuloj viaj bildon nun germanan, kies belegecon certe vi konfirmos. Vi vidu kian grandiozan mi ĉi tie perspektivon havas (*klakas per la manoj*).

(Muziko. La kurteno foriĝas kaj je la tuta larĝo de la scenejo vidiĝas granda fenestra malfermaĵo, tra kiu oni ekvidas belegan pejzaĝon. Ĉarma valo, trafluata de rivero, kaj en malproksimo ĉirkaŭata per montoj kun vilaĝoj tie kaj tie ekradias en vesper-rugo; la bazon de la kadro formas malalta balustrado. Antaŭe, maldekstre de la rigardanto sidas, kvazaŭ mistera fenomeno, sub malluma arbitaĵo, prilumata de la subiranta suno, la almozulo kun malkovrita kapo kaj al ĉielo direktata rigardo, en pentrinda pozo tiel, ke la tuto prezentas emociigan bildon.)

DEKOKA SCENO

La antaŭaj. La almozulo.

FLOTTWELL (*ne atente rigardante tien*). Ĉu ekzistas do elvid' pli bela? (*Ektimas, vidinte la almozulon.*) Ho, kia bild'! Hazardo stranga.

ĤORO kaj ALMOZULO (*kune*)

Rigardu, kia bela val',

Pli ĉarman eĉ ne havas ter',

Pli bela ol Svisujo al

Konanto ŝajnas ĝi laŭ ver'!

ALMOZULO

Nek sun', nek stel' por almozul'

Ĝojigo estas al okul'.

Malfidaj estas hav' kaj or',

Feliĉ' facile kuras for.

FLOTTWELL (*kui ĉiam ankoraŭ rigardegas la bildon, al Wolf*). Forpelu do la almozulon, kial vi lin lasas tiel proksimege ĉe l' kastel' restadi.

ALMOZULO (*ekstaras kaj iras laŭ la flanko, kie li sidis, trans la monteto, tra la malalta arbitaĵo en la scenejon*).

DEKNAŬA SCENO

La antaŭaj sen almozulo.

WOLF. Kian almozulon? Ni nenian vidas.

FLOTTWELL. Tie li iras! (*Postrigardas lin.*)

WOLF. Li konfuziĝas.

(*Amalie svenas.*)

KLUGHEIM. Ĉiela Dio! filino mia!

FLOTTWELL. Amalie? Kion ŝi havas?

(*Ĉiuj gastoj intermoviĝas.*)

KLUGHEIM. Ŝi paliĝas?

FLOTTWELL (*falegas al ŝiaj piedoj*). Amalie! Kornabin' karega! Aŭdu la voĉon de via Julius.

FLITTERSTEIN (*indigne lin repuŝas de ŝi*). For! deloganto, nun vi demaskigas vin.

FLOTTWELL (*ekprenas lian manon*). Sinjoro, kontentigon! Jen ekstremaĵo!

FLITTERSTEIN. Ĉu plaĉas? (*Montras al ĝardeno*).

KELKAJ GASTOJ. Haltu!

KLUGHEIM. Venigu kuraciston!

(*Lakeoj for.*)

WOLF. En la ĉambreton!

KELKAJ. Jen fino de la festo.

(*La alia duono foriras dekstren kun Klugheim kaj Wolf, kiuj kondukas Amalie; nur Dumont, kiu dum la konfuzo iris al la fenestro kaj estis kovrata pro la amasiĝo de la gastoj, restas. Meze de la fenestro li jetiĝas en la seĝon, eksaltas kiam ĉiuj estas for, apogas sin sur la balustrado, rigardas tra la lorneto kaj ekkrias entuziasme.*)

DUMONT. Dieca naturo!

DUDEKA SCENO

VALENTIN. Do lasu min, mi devas scii, kio okazis. Ĉiuj forkuras, kaj fraŭlino Amalie, oni diras, renversiĝis kiel peco da ligno. Ŝi ekhavis konfuziojn.

ROSA. Vi restos. Pri mia sorto vi estu zorganta (*ploregas*). Mi estas la plej ĉagrenita persono en la domo.

VALENTIN. Kion oni denove faris al vi?

ROSA. Sed paciencon! Morgaŭ mi iros al la tribunalo, ĉiuj estos arestataj, la sinjora moŝto, la ĉambristo, ĉiuj gastoj, la tuta kastelo kaj vi.

VALENTIN. Min ŝi ne ellasas. Kio do okazis?

ROSA. Vangfrapo preskaŭ okazis.

VALENTIN. Ho, tiam mi ĝojas, ke mi ne ĉeestis.

ROSA. La ĉambristo proponis al mi vangfrapojn. Nomis min ŝtelistino, postulis de mi juvelon, maldungis nin je la servo en nomo de sinjora moŝto kaj volis min eljetigi per la lakeoj.

VALENTIN. Tio ja estas tuta mondhistorio. Kiam do okazis ĉio ĉi tio!?

ROSA. Antaŭ kvaron horo, kiam ili estis orprenintaj la vazon supre en la salonego.

VALENTIN. Tio estas terura.

ROSA. Tiu homo ja pensas, ke oni ŝtelis sian honoron kaj reputacion.

VALENTIN. Kaj krome la juvelon. Ne, tion oni ne povas simple toleri.

ROSA. Vi devas min protekti. Mi estas ino, tro malforta, ne scias, kiel kondukti.

VALENTIN. Certe vi estas tro malforta.

ROSA. Vi estas viro al vi donita estas forto.

VALENTIN. Certe, al mi donita estas forto, tial mi pripensos ĝin.

ROSA. Mi iros jam hodiaŭ kaj morgaŭ plendos mi.

VALENTIN. Kaj mi foriros morgaŭ kaj plendos jam hodiaŭ! Kaj kie? Ĉe la sinjora moŝto, ĉar tio estas kulpigo, kiun oni ne devas sur sin lasi.

ROSA (*plorante*). Ĉu ne vere, vi ne kredas tion, ke mi la diamantojn prenis?

VALENTIN. Ne, vi estas ja tro virta, vi atencas la okulojn kaj ne la diamantojn.

ROSA. Sed nun ekmovu vin, ni pakos kaj foriros.

VALENTIN. La livreo restos tie ĉi, ĝi apartenas al la estro. Min apartenas mia lignaĵista vesto, kiun mi kun-

portis tien ĉi, la ceteran pakaĵon mi ne bezonas, vi al mi sufiĉas.

ROSA. Ni nin vivtenados jam.

VALENTIN. Mi revenos al mia lignajistmetio, sed antaŭe mi ankoraŭ devas fari mian majstraĵon.

ROSA. Kion vi do volas fari?

VALENTIN. La ĉambriston mi rabotos. Ho, li estas tro malglata kaj bezonas lignajiston.

ROSA. Gardu vin.

VALENTIN. Ho, vi ne konas min, mi estas la plej bona homo, sed kiam koncernas la honoron kaj reputacion, tiam mi ekkoleregi povas kiel leopardo. Mi montros tion al la ĉambristo.

DUDEKUNUA SCENO

La kelestro (*kuras trans la scenejo*). La antaŭaj.

VALENTIN. He, sinjoro kelestro, kien vi iras?

KELESTRO. De l' granda barelo krevis ringego, mi devas elĉerpi la vinon.

VALENTIN. Ho, tio estas signo de la sorto! viro, mi vin sekvos. (*Foriras kun la kelestro en tragedia pozo.*)

ROSA. Ho spektaklo! Nun li devas ebriiĝi, se li volas ekhavi kuraĝon. Ne! Kiaj mizeraj viraĉoj ekzistas en la nuna tempo, tio jam ne estas tolerebla (*for*).

DUDEKDUJA SCENO

Alia ĉambreto. Amalie. La kuracisto. Prezidanto de Klugheim.

KURACISTO. Ĉu vi sentiĝas pli bone, fraŭlino?

KLUGHEIM. Kiel vi fartas, kara infano?

AMALIE. Tute bone, kara patro! Ĝi jam pasis.

KLUGHEIM. Fatalo nin kondukis en ĉi tiun domon.

DUDEKTRIA SCENO

La antaŭaj. Betti.

BETTI. Helpon! Ho, sinjoro doktoro, la barono estas grave vundita, oni vin serĉas!

KLUGHEIM. Ĉielo! mia amiko! Restu ĉe mia filino. Venu sinjoro doktoro. Ho, mi estas kulpa pro ĉio (*for-rapidas kun doktoro*).

AMALIE. Kio okazis?

BETTI. Ili duelis! La sinjora moŝto kaj la barono.

AMALIE. Ĉu Julius ankaŭ estas vundita?

DUDEKKVARA SCENO

La antaŭaj. Julius Flottwell (*eniras tra tapeta pordo. Li estas pala kaj parolas duonlaŭte kaj rapide*).

FLOTTWELL. Ne! Li ne estas tia! (*Al Betti*) Iru spion-atendi! (*Betti iras antaŭ la pordon.*)

AMALIE. Ĉielo! kiel vi aspektas?!

FLOTTWELL. Kiel vir', spitanta sian sorton. Sed ne ankoraŭ iĝis for de mi bonŝanco mia, se mi nur vin paroli povas, ĉiu minuto nin minacas, kaj vi jam en ĉi tiu nokt' kun mi forkuri devas.

AMALIE. Neeble! Ne! La patron lasi mi ne povas!

FLOTTWELL. Vi ĵurpromesis, rememoru vian ĵuron.

AMALIE. Sed hodiaŭ kaj tiel urĝe —

FLOTTWELL. Hodiaŭ aŭ neniam! Jam longe mi aĉetis vian servistaron. Kunprenu Laŭra kaj neniom de propraĵo via. La patro estas laca, li baldaŭ ripoziĝos kaj eĉ se ne, sekreta amo estas eltrovema. Mi vin atendos proksimume ĉe la kapel' izola, nia ofta renkontejo.

AMALIE. Ĉu mia patro iam repaciĝos?

FLOTTWELL. Ho jes! La vasta mar', spitanta lian venĝon, subigos fierecon lian. Decidu vin.

AMALIE. Ho, ĉu mi povus vivi sen vi —

FLOTTWELL. Se vi ne povas, do ni estas jam konsentaj.

AMALIE. Kaj tamen —

FLOTTWELL. Jes aŭ ne! Ne, la ponardo estas, kiun vi en mian koron premas, jes, la suno, kiu lumos nin al Anglolandó.

AMALIE. Ankoraŭ unu nur demandon!

BETTI (*rapide*). La prezidanto!

FLOTTWELL. Parolu tuj!

AMALIE. Atendu min!

DUDEKKVINA SCENO

La antaŭaj. Prezidanto Klugheim.

KLUGHEIM (*indignite, severe*). Kion vi volas ĉe mia filino?

FLOTTWELL. Mi havis zorgon.

KLUGHEIM (*prenas Amalie al la maldekstra flanko*). Vi estas tro bonema kontraŭ mia familio. Venu, filino mia, la veturilo atendas, poste mi akompanos la baronon. Sinjoro! Vi invitis nin al festo, (*kun melankolio*) kaj ni vin dankas kun rompitaĵoj pro la grandaj ĝojoj, kiujn vi al ni preparis (*forkondukas sian filinon. Betty sekvas*).

DUDEKSESA SCENO

FLOTTWELL (*sole*). Ho, obstin' de vir' maljuna, kiom da fatalo ci kunvokas al la kap' de tiel multaj homoj.

DUDEKSEPA SCENO

La antaŭa. Wolf (*envenas*).

FLOTTWELL. Ho, Wolf! Vi bone venas! Jen moment', en kiu vi min danki povas, ke mi estadis pli amik' al vi ol estro. Ĉi tiun nokton mi jam kun Amalie al Angluj' forkuros, kaj vi decidu mem, ĉu vi nin volas akompani.

WOLF. Ho, mia bona estro! Al deziro via estas ja ligita mia volo; kaj kien iros vi, jen estos mia hejmo.

FLOTTWELL. Mi havas grandajn sumojn en la angla banko. Saveblajn oron kaj juvelojn mi kunprenos. La

restaĵon en pupitro mia vi partigu inter la servistoj, sed nenion diru. Deziras mi, ke ili trovu estron al ili tiel bonintencan, kia estis mi. La ambaŭ boatistoj sur la lago, kiujn mi de longe por ĉi tiu kazo dungis, estu pretaj. En unu horo plej malfrue ĉio estu ordigita. Tiam mi atendos vin ĉe la kapel' malnova. Donacon vian gardu bone; ĝian valoregon vi ja konas. Estu singardema, mi konfidas ĉion je fidelo via (*for*).

DUDEKOKA SCENO

WOLF (*sole*). Anglujon vi ŝipiros, bonan venton, mi ĉi tie restos, kaj ŝipeton mian al haven' direktos. Kiele do la suno sub- kaj supreniras. Kiu do la enviinda estas? Ĉu li la protektant' fiera kaj glorata, kiu la restaĵojn de feliĉo sia kun disiĝa animstato al la malfidela mar' konfidi devas? Aŭ ĉu mi, la milda, la modesta nur ĉambristo, kiu la senbrue akiritan ŝafideton tre humile en la sekan lokon meti povas; kaj al kiu dankas mi ĉi tiun venkon? (*Frapas sian frunton.*) Al vi prudento, plej multflanka de l' diinoj! La naturo donis nur al mi tre fortan galvezikon, ne krevintan ĉe la tuta sensencaĵo, kiun mi en tiu domo dum kvin jaroj devis vidi; sed la ruzo min instruis ridetadi. Ho, estas la rideto grava eĉ afero. Kiel multaj homoj perridetis sian vivfeliĉon, kaj stultulo povas esti dum minuto rigardata vir' prudenta, se li scias nur rideti. Tial mi rideti volas dume mi ankoraŭ vivos, kaj fine eksonigi laŭtan ridon, kiun sekvos mortsilento (*for*).

(*Kiam li estas jam en la kuliso, reprenas lin Valentin. Li surhavas sian lignajistan veston kaj vaksotolan ĉapelon. Pluvombrelon kaj promenbastonon kunligitajn sub la brako, kaj malgrandan valizon sur la dorso; el la poŝo elstaras la mallonga tubo de lia pipo. Li estas ebrieta.*)

DUDEKNAŬA SCENO

Valentin. Wolf.

VALENTIN. Haltu, barbaro! Kien vi volas? Vi ne moviĝos de ĉi tiu loko. Kiel vi kuraĝas kalumnii mian amatinon? Kion faris ŝi al vi? Ŝi ne akceptis viajn amproponojn, ĉar vi estas tro malbela. Ĉu ekzistas pli grandega virto? Ŝi estas mia fianĉino kaj vi kredis min trompito! Ŝi laŭdire ŝtelis ornamaĵon, tiu ĉi persono senornama? Fi, hontegu, ĉambristaĉo!

WOLF. Nun estas urĝa tempo, ke vi iru el la domo, vi ebriegulo!

VALENTIN. Ho, mi havas sufiĉe da tempo! Mi fakte sur ĉi tiu mond' ne havas plu por fari, krom diri al vi mian opinion. KREDU min sinjor' ĉambristo. — Mi vin certigas, ke vi estas malicega homo. Vi min, serviston kompatindan, kiun lia estro honeste kaj fidele priservadis, forigis el la domo (*ploregas*). Sed la ĉielo vin pro tio punos.

TRIDEKA SCENO

La antaŭaj. Rosa (*ankaŭ ekipita al formigro, kun kelkaj pakaĵoj kaj sunumbrello*).

ROSA. Kion vi do faras, Valentin? Do lasu lin. Mi aŭdis ja, ke vi ebria estas!

VALENTIN. Kiu al vi malkovris tion? Ho, mi estas perfidita.

WOLF. Nun foriĝu ambaŭ!

VALENTIN. Ĉu ni forigu nin? Ne, ni forigos lin!

ROSA. Hontu do.

WOLF. He! Lakeoj!

(*Lakeoj venas.*)

WOLF. Forpelu tiujn ĉi fiulojn el la domo! Tion mi al vi ordonas en la nom' de nia moŝtsinjoro (*foriras*).

VALENTIN (*alpaŝas lakeon simile vestitan kiel la ĉambristo*). Kio? vi nin volas eljetigi, aĉa perfidulo?

ROSA. Kion vi do faras?

VALENTIN. Min lasu, la ĉambristo devas morti inter miaj manoj.

ROSA. Li ja ne estas la ĉambristo.

VALENTIN. Ĉu ne? Malgrave. Alia do fripono.

(*Lakeoj ridas.*)

ROSA (*volas fortiri lin*). Do iru nur.

VALENTIN. Li neŝajnu sin ĉambristo, tiu homo, kiu en la ĉambron iri tute eĉ ne rajtas.

LAKEOJ. Nun for! Pluaĵon estas ni farontaj.

HORO

For! Tuj! En la sama hor'

El la domo iru for.

Ĉar nun estas jam tro multe

Fikonduti tiel stulte:

Drinki fie

Ĝis ebrie.

Sen favor'

Iru for!

ROSA.

Ke pro gut' da vinbersuko

Hom' kun tia boneduko

Povas perdi el la nuko

Tiom de la cerbomuko,

Ke ĉapelon li kun buko

Interŝanĝas kun peruko,

Estas granda menskaduko.

VALENTIN.

Homoj, kredu min, je vero,

Ĉio estas nur ĥimero.

Post dek kruĉoj da biero

Restas poŝo sen monero;

Tial mendas en kolero
Mi ankoraŭ ĉe kelnero
Unu kruĉon da biero.

ĤORO

Helpos Dio vin nenia,
Forrapidu gento fia.

ROSA.

Iru dormi, kara mia.

VALENTIN.

Ho, mi estas plen' ebria.

ĤORO

Tedas nin spektaklo tia,
Tial kun pakajo via
Iru pro malbona mor'
Tuj el la kastelo for.

(Kondukas ilin for.)

TRIDEKUNUA SCENO

La almozulo. Flottwell.

Muziko. La interno de tute ruiniginta gotika kapelo. Ankoraŭ nur la muroj staras. La luno lumas sur nubkovrita ĉielo, kaj ĝia lumo radias ĝuste tra la enirpordego, tiel, ke la almozulo, parolante la lastan parolon, ĝuste estas prilumata de ĝi.

ALMOZULO (*sidas ĉe la angulo de la malantaŭa muro en malhelo sur malalta ŝtono*).

FLOTTWELL (*en rondforma mantelo volvita eniras*). La nokto malvarmetas. Oriente ekleviĝas fulmotondro. Se ĝi nur baldaŭ preterpasos! Kio murmuretas? Ĉu mi ne estas sola tie ĉi, kaj kiu kaŭras tie sur la tero? Elvenu!

ALMOZULO (*ekstaras*). Jen estas mi, sinjora moŝto, kaj mi longe jam atendis vin.

FLOTTWELL. Pro kio min ĉi tiu almozul' hodiaŭ trian fojon jam renkontas?

ALMOZULO (*venas antaŭen je unu paŝo, kaj nun prilumas lin la luno*).

FLOTTWELL. Ho, kiel lun' vizaĝon lian akre prilumigas! Kion volas vi de mi, vi bildo de la memkreita mizerego! ALMOZULO (*genuas*). Ho, la malesperiga sorto de mizer' sekretoplerna mia kaj la kortimego, ke vi ĉi tiun landon nun forlasos, min devigas, ree ĵeti mian korpon kadukintan en la polvon. Vi estas la unika en ĉi tiu senkompata mond', al kies kornobleco mi ankoraŭ povas fidi. FLOTTWELL. Ho, for de mi! ju pli mi vin rigardas, des pli teruras min aspekto via. Ne trudu ĝin, mi ne plu vidu vin!

ALMOZULO. De vi dependas, moŝtsinjur', min tute forpeligi. Sed multon vi oferi por ĉi tio devus. Ho, donu la duonon nur de la trezor', sur via brust' kaŝita, kaj vi neniam plu min aŭdos ĝemetadi ĉe piedoj viaj. FLOTTWELL. Fantom' avida! ĉu satano vin malbenis, ke vi la oron de la ter' fortrenu al infero? Pretendon tian eĉ frenezo ne elpensi povis: Almozulo, peteganta milionojn.

ALMOZULO. Postuli ilin estas pli prudente ol malŝpari kiel vi.

FLOTTWELL. Ĉu vi kuraĝas respondi min, rampaj' sendanka, kiun pridonacis tiel riĉe mi.

ALMOZULO. Neniam ĉesos almozul' envii la riĉulon.

FLOTTWELL. Laŭ proŝtelista hundbojeg' blekado lia sonas tra la nokto.

ALMOZULO (*kriante al la enirejo*). Ho aŭdu, mond' kaj ĉiuj homoj, ke superriĉa vir' mizeri lasas almozulon.

FLOTTWELL (*duonlaŭte*). Ĉi tiu kriegad' terura min perfidos. Silentu kaj ekhavu tiun oron por satigi vian avidemon (*jetas al li unu sakon*).

(Malproksima tondro.)

ALMOZULO (*eklevas ĝin kun laŭta ĝemado*). Ĝi estas tro malmulte. Tro granda la mizer'. Al mond' mi plendos daŭre kaj la homoj juĝu inter ni.

FLOTTWELL. Se ne la or', do tiu ŝtalo vin mutigos (*eltiras la spadon kaj volas lin vundi*).

ALMOZULO (*restas starante*). Mortigant'! Vi vane furiozas. Vi ne vundis min. Postulo mia povas sole min pacigi. (*Petante*) Ho, nun se vi plenumus mian peton!

FLOTTWELL (*obstine*). Ĉu per devigo? Ne!

ALMOZULO (*duonlaŭte*). Do kuru, malŝparulo, for! Sed min vi ne forkuros, kaj ĉe la Temse vi revidos min (*for*).

(*La luno kaŝas sin post la nuboj, oni aŭdas muĝadon de l' vento, fulmoj lumas.*)

FLOTTWELL. Dum mi rigidobservis en lunlum' vizaĝon lian palan, al mi ekŝajnis, kvazaŭ mi de l' patro la spiriton vidas. La nokt' ventegas. Ho, ombraĵo jen alflugas.

TRIDEKDUO SCENO

La antaŭa. Amalie (*volvita en mantelo kun kapo kovrita per vira ĉapelo, envenas senspire*).

FLOTTWELL. Wolf, ĉu estas vi?

AMALIE (*falegas elĉerpita en liajn brakojn*). Ne! estas mi, ho Julius!

FLOTTWELL (*ravita*). Amalie! Korknabino! Vi do sole venas?

AMALIE. Neniun mian servistinon mi sukcesis decidigi partopreni la ne certan sorton de l' estrino. Mia patro maldormas ĉe l' barono; do ni forkuru tuj; veninte hejmen li deziros min paroli.

FLOTTWELL. Doloro mi postlasas la fidelan Wolf, sed urĝas la danĝer'; se ni la fulmotondron nur ne devus timi.

TRIDEKTRIA SCENO

La bordo de la lago.

Sur roko ŝipistkabano. Max kaj Thomas, du ŝipistoj tiras boaton kun unu velo al la bordo. La ondoj de la lago leviĝas alten. Ne estas tute mallume, sed dubflava lumo.

Max kaj Thomas.

THOMAS (*staras sur la roko kaj tiras la ŝipon*). Entiru, l' velon, Max aŭ ŝiros ĝin la vento.

MAX (*faras ĝin*). La hundvetero devis veni por al ni la gajnon malpliigi.

THOMAS. Se oni frumatene ja ekvidas tuj grumblantan virinaĉon, ĉiam la diablo fiveteron sendas.

MAX. Ne blasfemu, aŭ la ondoj plue kreskos.

TRIDEKKVARA SCENO

La antaŭaj. Flottwell. Amalie.

FLOTTWELL. Ĉu estas vi? nun ni foriru tuj!

THOMAS. Ne pensu pri vetur' dum tia fivetero!

FLOTTWELL. Ni devas for! Mi vin ja dungis firme!

MAX. Por transŝipiĝo jes! Sed kiom pagos vi al ni por drono!

THOMAS. Dekfoje la venteg' renversos la boaton.

MAX. Ne velveturos ni.

FLOTTWELL (*malespere*). Vi devas.

THOMAS kaj MAX. Ni ne volas.

AMALIE (*por si*). Ĉielo, ho vi punas min jam en ĉi tiu horo.

FLOTTWELL. Al vi la kapon mi trapafos tuj. (*Minacas per pistolo.*)

THOMAS (*forbatas la pistolon al li per la remilo*). Nu, lasu la stultajon, la vetero jam pafigos.

MAX. Devigi vi nin povas nur aliamaniere.

FLOTTWELL. Nu bone! Mi al vi kvin cent dukatojn donos, kiam ni la lagon havos post la dorso.

THOMAS (*al Max*). Jen vorto! Kamarad', ĉu riskos vi la vivon?

MAX. Kial ne? Mi ja ne sola dronos.

THOMAS (*batas en la manon de Flottwell*). Je vent' kaj rifoj', laŭ kontrakt'. Sed aŭdu, ke virin' ĉi tiu nur ne krii do. La lago estas kiel mia fiedzin'; se oni timas ŝin, ŝi des pli krias, sed post bat' remila sur buŝeg', ŝi cedas tuj. Nun venu!

FLOTTWELL. Do, je bonŝanc'!

(Ĉiuj kvar iras al la ŝipo. Muziko komenciĝas. Post ioma jetiĝado de la boato ili forremas. La fulmotondro furiozas. Ekbatas fulmo. La mevoj flugas trans la scenejo. Sed subite la uragano kvietiĝas, la ondegoj malaltiĝas, la luno sin montras duone inter la nuboj kaj prilumigas la almozulon, kiu kline sidante sur malgranda apenaŭ videbla boato kun per ventego ŝirita velo, malrapide preterveturas. La muziko ludas la melodion de lia almozula kanto. Kiam li forestas, pliĝas la ventego, kaj la kurteno falas.)

TRIA AKTO

UNUA SCENO

La kastelo de Flottwell kiel en la komenco de la dua akto, nur la prakastelo en malproksimo disfalas je ruino. Flottwell aspektante tute kiel la almozulo sidas ĉe la levigo de la kurteno en la sama loko, kie sidis la almozulo. Post finiĝo de la enkonduka muziko, kiu ĉe la malfermo de la scenejo daŭris ankoraŭ dum kelkaj taktoj, li ekstaras.

FLOTTWELL (*sole*). Do mi revidas vin post dudek jaroj, fiera ĝojotemplo vi, de mia viv' somera. Vi staras tie ĉi severe tiel kaj enpense, kiel monument' de tombiĝinta feliĉeg'; iama la gajemo ankaŭ ŝajnas esti forlasinta vin! El la fenestroj de ĉi tiu marmorhalo iam sonis ĝojkriado, arĝentaj ĵetkubetoj ruliĝadis sur la verda tablo, ebriaj kunludantoj min tostante malplenigis la pokalojn orajn, kaj petolema ĝojo svingis siajn flugilegojn. Nun ĉio eksilentis kaj mutiĝis, la maten' jam longe sian gajan kanton kantis, kaj tiu pord' ankoraŭ estas firmfermita aŭ ĉu vi en tiu ĉi momento nur aspektas tiel serioze, ĉar vin salutas nun fondinto via? De kiam mi ne vidis vin ŝanĝiĝis mia sorto multe. Edzinon, idon kaj eĉ tutan mian havon mi per propra kulpo perdis. Ĉi tie persekuton mi ja ne bezonas timi, ĉar Flitterstein, plej granda mia malamiko, mortis en batalo. Sed kie petu mi pro helpo en ĉi tiu stato? La nobla prezidant' — li ja pardonis antaŭ sia mort' al ni — delonge jam transiris. Mi skribis al amikoj kelkaj, sed neniuj volas la malriĉan

Julius-on plue koni. Do mi ankoraŭ laston volas riski, laŭ almozul' mi volas min konfidi al fremdulo, al posedant' de tiu ĉi kastel' mi volas diri, ke la unua mi ja estis, de kiu la okul', kun estrovid' en tiu ĉi propraĵo ĉarma diboĉadis, kaj ke mi nune plu nenion nomas mia, ol tiun ĉi bastonon almozulan; kortuŝos eble lin la granda de mizero mia. Jen venas ĝardenisto, tiun mi demandos.

DUA SCENO

La antaŭa. Ĝardenisto kun verŝilo. (*Li estas flegma kaj iom kruda.*)

FLOTTWELL. Bonmatenon!

ĜARDENISTO (*rigardas lin suspekta*). Bonmatenon. (*Por si*) Mi tamen devas deĉenigi l' grandan hundon, ĉar venadas tiom da homaĉoj.

FLOTTWELL. Amiko mia, ĉu bonvole vi min diros, kiel nomas via moŝtsinjoro sin kaj kiel longe li posedas tiun ĉi kastelon?

ĜARDENISTO. Vi certe volas ion peti?

FLOTTWELL. Mi lin paroli volas.

ĜARDENISTO (*por si*). Li tamen ŝajnas esti ne ŝtelist'! (*laŭte*) Nun povas esti ĉirkaŭ dekdu jaroj (*kalkulas*). Konstruis Flottwell ĝin, li kuris for Anglujon, jen ĝin aĉetis grafo, tiu mortis, kaj nun prenis ĝin sinjoro mia, tiu certe ĝin konservos ĝis la morto.

FLOTTWELL. Ĉu vi jam longe servas lin?

ĜARDENISTO. Sufiĉe longe, sed hieraŭ li maldungis min persone.

FLOTTWELL. Kiel oni lin titolas?

ĜARDENISTO. Sinjor' de Wolf.

FLOTTWELL. De Wolf? Pri tiu familio mi neniam aŭdis?

ĜARDENISTO. Jes, tiu familio estas ne tre altdevena, li ĉambristo estis ĉe Flottwell.

FLOTTWELL (*rapide*). Ĉambristo mia? (*rekonsciiĝas*) ne do —

ĜARDENISTO (*largigante la okulojn*). Kion pensas vi? (*Por si*) Ĉi tiu vir' ne ŝajnas cerbosana (*montras al kapo*). Nun la mizera viro eĉ ĉambriston volas havi. (*Laŭte*) Ĉe Flottwell mi ja diris, kiu mortis jam en Ameriko. FLOTTWELL. Do supozeble via estro faris grandan heredaĵon?

ĜARDENISTO. Nenion faris li, Flottwell-on li nur ege trompis, de tie la riĉeco venas; tiu lin eĉ pridonacis krome kaj dorlotis. Nia estro poste lin priridis bone kaj post lia morto lin eĉ kalumniis. Jen sorto de la sinjoridoj, kiuj nur diboĉas kaj nenion perlaboras. Al flatemuloj ili ĉion donas, la aliaj homoj ilin ne egalas, kaj kiam ili mizeriĝas, ĉiuj ridas (*donas al li tabakon*). Ĉu vi volas flari?

FLOTTWELL. Mi dankas! (*post iom da meditado*). Mi tamen volas lin paroli.

ĜARDENISTO. Nu, se vi trovos lin en bonhumoro, li eble donos al vi ion (*enpoŝigas manon*). Mi ankaŭ volas doni al vi ion por glaset' da brando.

FLOTTWELL (*moke*). Vi estas tre afabla. Mi tre dankas vin.

ĜARDENISTO. Nu vidu, mizerul' estante, oni prenu ĉiun groŝon. Tamen vi plej bone devas scii, kiel statas via kaso!

FLOTTWELL (*sopirante*). Mi dankas tre al vi pro la instruo. Sed mi miras, ke vi pri via estro ĉion tiel tre senĝene rakontadas.

ĜARDENISTO. Iam mi ne estus ĝin dirinta. Sed mi iras nun en kelkaj tagoj for, do jam ne interesas min.

FLOTTWELL. Ankoraŭ tion diru nur al mi: Ĉu la sinjor' de Wolf feliĉa estas, kiel posedant' de ĉi maljusta havo? (*La pordego malfermiĝas.*)

ĜARDENISTO. Ĉu li feliĉa estas? Jen rigardu lin kaj vin konvinku mem.

TRIA SCENO

La antaŭaj. Wolf. (*Li tre maljuniĝis, aspektas malsane, surhavas pelton. Tri lakeoj kondukas lin.*)

FLOTTWELL (*ekrepaŝas*). Ĉielo! Mi ne estus rekoninta lin.

WOLF (*lia konduto estas tre malserena kaj medita*). Malbonan nokton havis mi, la sun' hodiaŭ ŝajnas min malklara.

ĜARDENISTO. Sinjora moŝto, malriĉulo volas vin paroli.

FLOTTWELL. Mensogas vi, mi tia ne plu estas (*por si*).

En tia proksimec' konscio mia min riĉigas.

WOLF. Ne povas esti pli mizera li ol mi. Kie li estas?

FLOTTWELL (*antaŭpaŝas*). Flottwell li sin nomas.

WOLF (*skuigas*). Ĉu Flottwell? (*tuŝas sian flankon*).

Jen tio pikis min. Malica la artrito estas eĉ pli senkompata ol la homoj. (*Por si*) Ĉu li ankoraŭ vivas kaj revenas tia? Tiel la ĉielo punas la pekintojn.

ĜARDENISTO. Ĉu tiu estas la riĉega Flottwell? Nu, bonan nokton; mi preferas esti ĝardenisto (*foriras*).

KVARA SCENO

La antaŭaj sen ĝardenisto.

WOLF. Sinjor' de Flottwell, mi min sentas tiel honorata, ke vi ankoraŭ nun memoras vian eksserviston, kaj mi nur bedaŭras, ke malsano mia ne permesas al mi pruvi mian ĝojon tiel brile, kiel tion vi de mi pretendi povus.

FLOTTWELL. Nenion mi pretendas, tute plu nenion. Kion rajte mi pretendi povus, pli alta (*rigardas ĉielen*) ĝin al mi jam donis. Mi volis nur la estron de kastelo mia vidi.

WOLF (*ridetante*). Jes, tute stranga estas la hazardo. Per tio pruvis veran sindonemon mi por via domo. Ĉielo benis min per gajno, sed nun mi multe malprofitis. Par-

donu, kuracisto ne permesas min, paroli tiom, mi scias ŝati la honoron de vizito via. (*Al la lakeoj*) Konduku min al tiu elvidejo. Sed ne! En la kastelon ree! Ĉi tion ankaŭ ne! Al la ĝardeno. Ĝi estas tiel bela, nur domaĝe, ke la rozoj jam forvelkas (*ekmeditas*). Kiel ofte mi ankoraŭ vidos ilin flori? (*ektremas*). Hodiaŭ estas tag' malvarma. FLOTTWELL. Al mi la suno varme brilas.

WOLF. Mi frostas. Iru do en la vilaĝon kaj venigu tiun pian viron, kiun tiel eme mi ĉi tie havas, ke li al mi moralan libron legu. Mi aŭdas tre volonte la legadon de moralaj libroj; la mondo estas tro malbona, kaj konsolon sian oni nur en la estonto trovos. (*Treniĝas al la ĝardeno, la lakeoj lin sekvas.*)

FLOTTWELL (*al la lasta de la servistoj*). La estro estas malsanega! Ĉu amata? Ĉu oni longan vivon do al li deziras?

SERVISTO (*skuas la kapon kaj diras indiferece*). Li estas avarul', amata de neniuj, kaj en kelkaj nur semajnoj li finiĝos certe. Adiaŭ! (*sekvas la aliajn en la ĝardenon*).

FLOTTWELL (*rigardas ĉielen kaj kunbatus la manojn*). Ho, Flottwell-kastelo! Kiajn homojn vi loĝigas nun! Kion mi nun faru? Malmultajn la talerojn, kiujn mi ankoraŭ havis, mi konsumis dum migrado mia multmonata. Mi ŝparis kaj nur sekan panon manĝis kaj tamen eĉ fenigon mi ne plu posedas! Jen mia prakastelo! (*rigardas la ruinaĵon en la malproksimo*). Simbol' de mia nuna feliĉeco: Ĝi disfalis. (*Kun interplektitaj brakoj li restas staranta meditante.*)

KVINA SCENO

La antaŭa. Valentin (*en burĝa kostumo kiel lignaĵistmajstro, kun rabotilo en poŝo, venas trilante. Li jam havas malhelgrizajn harojn.*)

VALENTIN. Fruleviĝas lignaĵist', tra la, la, la — (*vidas Flottwell*) ho, vidu, jen malriĉa vir', mi devas ion doni

(li elpoŝigas groŝon kaj volas ĝin doni al Flottwell, sed li ekatentas, ekvidinte lin). He, paĉjo!

FLOTTWELL (turnas sin kontraŭ li). Kio —

VALENTIN. Ho, tiu ĉi vizaĝ' — konata ŝajnas min —

Nun mi eĉ timas doni al li groŝon —

FLOTTWELL. Kion vi do volas?

VALENTIN (ankoraŭ pli ekscitita). La voĉ' — li do ne estos? (li tremas) aŭdu — estus ja terure — ho, pardonu! Ĉu vi konas la kastelon?

FLOTTWELL (kortuŝite). Ĉu mi ĝin konas? Ho, amiko, ĝi estis ja propraĵo mia!

VALENTIN (krias tuj). Ho, mia moŝto, mia moŝto!

FLOTTWELL. Kiu estas vi, amiko?

VALENTIN. La Valentin. Ĉu via moŝto min ne konas plu? La lignaĵisto, kiu iam ja ĉe vi laboris, kaj kiun vi akceptis por lakeo, ĉar li tiel bone plaĉis vin.

FLOTTWELL (boneme). Ĉu Valentin? la bona, la honesta Valentin? kaj vi ankoraŭ min memoras?

VALENTIN. Ĉu mi memoras? Mia Dio! Via moŝto estis ja al mi tiel bona kaj tiom pridonacis min. Dŭkaton unu mi ankoraŭ nun konservas, (boneme) sed la aliajn mi elspezis.

FLOTTWELL. Kaj ĉu vi bone fartas?

VALENTIN. Nu, kiel povas farti lignaĵist' malriĉa. En la kamparo oni ja ne multe povas fari. Mi estas ja kontenta.

FLOTTWELL. Do feliĉa ankaŭ!

VALENTIN. Nu, tiel kiel Dio volas! Sed via moŝt' ne ŝajnas esti tre kontenta.

FLOTTWELL. Ĉu ne, mi tre ŝanĝiĝis?

VALENTIN (embarasita). Ho ne! ne! Via moŝto bone ja aspektas — bone — tute bone —. Iom konsumita, sed — (flanken) tion oni al sinjoro tia do ne povas diri.

FLOTTWELL. Ho, mia bona Valentin, nun mi vin pridonaci ne plu povas.

VALENTIN. Ĉu pridonaci? Via moŝto min do ne plu volos pridonaci!? Mi ja al via moŝto devus diri eĉ malĝentilaĵojn (rekonsciiĝas). Pardonu! Mi kelkfoje parol-aĉas, kvazaŭ mi en kapo rabotajon havus. De kiam mi fariĝis ree lignaĵist', mi perdis mian tutan polurecon.

FLOTTWELL (por si). Ĉu mi malkovru min al li?

VALENTIN (por si). Mi ne kuraĝas lin demandi, li ŝajnas malsatega.

FLOTTWELL. Ĉu vi iros hejmen?

VALENTIN. Ne! Mi en la gastejo tie estas kunnajlonta pordon, ĉar hieraŭ oni elen ĵetis iun, kaj li ektuŝis pordon, kaj ĝi krevis.

FLOTTWELL (luktas kun si, ekĝemas, tuŝas la frunton kaj poste diras). Adiaŭ do! (volas iri).

VALENTIN. Ho, kien via moŝto volas iri? Via moŝto do ne volas reforkuri min? Nur nun mi ja ekhavis la honoron vidi (flanken). Se mi nur scius, kiel mi ekfaru la aferon?

FLOTTWELL (sopiras). Kion vi ankoraŭ volas?

VALENTIN. Pardonu, via moŝt' — sed diru, via moŝt', al mi sincere, ĉu via moŝto por hodiaŭ estas invitita jam?

FLOTTWELL (ridetas). Ne, karulo!

VALENTIN. Ĉu povas mi kuraĝi kaj peti la honoron al malbona dommanĝaĵo?

FLOTTWELL. Mi dankas, honestulo, vin; mi venos.

VALENTIN. Ne veni. Tute ne. Mi vian moŝton jam ne lasos. Sian pordon ili mem kunnajlu. Mi nun kun mia moŝtsinjoro devas iri hejmen.

FLOTTWELL. Do venu!

VALENTIN. Sed tion mi tuj diras, ĉe mi ne okazos tiel, kiel iam okazis tie ĉi (montras al la kastelo) — Ah — (frapas sian buŝon) denove tia rabotaĵa babilaĉo.

FLOTTWELL. Mi pri ĉio kontentiĝos.

VALENTIN. Ne, ne! Ne tiel malsukcesos, mi ja mem kuiras. Ho, ni klopodos, mi kaj mia edzinet. Troviĝos ia plumbirdaĵo maljuneta. Dum Valentin ankoraŭ ion havos, via moŝto ne pereos. Kaj nun ni instaligos, sed ne tiel simple. Via moŝto devas havi sian ovacion. Mi antaŭeniros kaj via moŝt' min sekvos kaj ĉiuj miaj idoj devas laŭspalire stari, kaj kiam via moŝto venos, ili devos krei, ke al ili brusto preskaŭ krevos: Vivu la sinjora moŝt' de nia patro, vivu!

FLOTTWELL. Bona Valentin!

VALENTIN. Jen estas vivo en la mond'! (*foriras brak' en brako*).

SESA SCENO

Lignaĵista laborejo.

Rabota stablo. Lignaĵista ilaro sur la muro. Tablo kaj seĝoj. Maldekstre fenestro, dekstre flanko pordo. Lise pelas Michel, kiu surhavas peltan ĉapon kaj per rimeno kunligitajn librojn, el la kabineto. Hisel sidas ĉe la stablo.

Lise, Michel, Hisel, Hansel, poste Pepi.

LISE. Atendu, fripono, ĝis patrino venos. Mi vin instruos frandi. Apenaŭ li venas hejmen, jam oni devas koleri.

MICHEL (*plorante*). Patrino ja permesis.

LISE (*forŝiras al Hisel la segilon el la mano*). Lasu ĝin, mi diras, vi ruinigos ĝin al patro.

HISEL. Mi jam laboras same bone kiel la patro (*martelas*). PEPI (*volas eliri el la kabineto, sed falas kaj ploras*).

LISE. Levu la bubon. (*Ŝi levas lin, li surhavas ankoraŭ la infanan jupeton, kaj starigas lin sur la tablon.*) Nun li ankoraŭ ne estas vestita. (*Ŝi vestas lin per lia kamizolo.*)

MICHEL (*tiretas ŝin je la jupo*). Donu al mi la ŝlosilon, ke mi povu konservi miajn lernolibrojn.

LISE. Lasu min, mi devas vesti la bubon antaŭ ol la patrino venos. Jam estas dekunua.

HANSEL. Hisel, venu for! Ni surgrimpos la kolombejon.

LISE. Ne, kiam la buboj venas hejmen el la lernejo, ili estas nesufereblaj.

HISEL (*martelas*).

LISE. Ĉu vi ne ĉesos marteladi?

MICHEL (*montras al la elirejo*). La viando superbolas.

LISE (*sidigas la malgrandan bubon en la mezo de la ĉambro, la bubo krias*). Gardu la malgrandan bubon! (*elkuras.*)

HANSEL (*vokas*). Hisel! Iru for!

SEPA SCENO

La antaŭaj. Valentin. Flottwell.

VALENTIN. Bonvolu enpromeni via moŝto. Ne falu via moŝto pro la bubo. Kiu do metis lin jen en la mezo de la ĉambro, mi petas pardonon! ĉio estas en malordo. Alportu puran seĝon!

MICHEL (*kuras en la kabineton kaj alportas lignan seĝon*).

VALENTIN. La rabotaĵon for!

(*Hisel faras ĝin.*)

VALENTIN (*al Michel*). Alportu kusenon!

(*Michel forkuras kaj faletas.*)

VALENTIN. Nun li renversas la gluaĵujon, kiel plaĉas al via moŝto tiu mastrumaĉo?

MICHEL (*alportas litkusenon*).

VALENTIN. Kion vi do faras? Prefere tuj alportu kusenegon (*forpelas lin; al Flottwell*). Mi petas sidigu vin. Lisel, kie vi do estas? Envenu do, ĉiuj infanoj! (*Lise, ĉiuj infanoj krom Hansel.*)

VALENTIN. Kie do estas Hansel?

LISE. Li jam denove estas for.

VALENTIN (*ekrigardas tra la fenestro*). Jen mi havas la honoron prezenti mian familion. Unu, du, tri, kvar kaj la kvina sidas sur la kolombejo. Mia edzino tuj venos hejmen, ŝi havos plezuron. Hansel envenu rapide. HANSEL (*krias*). Mi ja ne povas tiel rapide malsupren-rampi.

VALENTIN. Do falu malsupren. Nun venu tien ĉi, infanoj, starigu vin en rondo.

(*Hansel venas.*)

VALENTIN. Jen rigardu la sinjoron; li estas mia kara, bona sinjora moŝto, pri kiu tiom mi al vi rakontis, kiu al via patro kaj al multaj cent gehomoj faris bonon. Iru tien ĉi kaj kisu lian manon ĉiuj. (*La infanoj faras ĝin, dume Hansel diras*): Patro, li ja tute ne aspektas kiel moŝtsinjoro.

VALENTIN. Silentu, vi ne estas sperta, kion vi komprenas pri sinjora moŝto.

(*Hansel kisas al Flottwell la manon.*)

PEPI (*ankaŭ ĝin faras*). Via moŝto! Pepi ankaŭ manon kisi.

VALENTIN. La plej juna ido de mia kaprico, via moŝto. LISE (*embarasite*). Via moŝto! Nia sinjoro patro diris tiom da bono, karo kaj belo pri via moŝto, ke ni tre ĝojas, konatiĝi kun sinjora moŝto.

FLOTTWELL. Ĉielo! (*Falas de doloro kaj honto subigita al la seĝo kaj kovras per ambaŭ manoj la vizaĝon.*)

LISE (*mallaŭte*). Patro! la sinjoro kompatigas min, li certe fartas tre malbone.

VALENTIN (*same tiel*). Ne rimarkigu tion, mi parolos pri tio.

(*Lise foriras.*)

VALENTIN. Iru nun, infanoj, iru iom en la korton. (*Al Hisel*) Vi elektu la plej grasan anasinon, (*al Michel*) kaj vi serĉu vian patrinon.

OKA SCENO

Valentin kaj Flottwell solaj.

VALENTIN. Mia Dio! La infanoj ankoraŭ scias nenion pri la mondo. (*Sopiras*) Ja, ja! Ne ĉagreniĝu tiom, via moŝto. Mi mem ne multe havas, sed via moŝto ne pereos. Sed rakontu al mi foje, via moŝto, kiel tiu malfeliĉo okazis.

FLOTTWELL. Mi vivis kun mia nobla edzino, kiu naskis al mi filon en London-o, dum ok jaroj tute feliĉe. Sed dum vojaĝo al Sud-Ameriko, de kiu ŝi min vane provis retenigi, kvazaŭ ŝi suspektus mian malfeliĉon, la morto forŝiris al mi ambaŭ. Mi revenis London-on kaj serĉis distraĵon. Mia elspezo kreskis! Mi entreprenis grandiozajn spekulaciojn, kiuj havigis al mi gloron, sed nenian gajnon; kaj post malmultaj jaroj mia havaĵo fandiĝis ĝis malgranda restaĵo. Jen mi ektimis. Mi decidiĝis reveni al mia patrujo kun la intenco, ĉiurilate moderiĝi. Mi venis Germanujon. Malfeliĉa ideo instigis min viziti Wiesbaden-on. Tie mia facilanimeco trovis sian limon. Post dudek jaroj mi refoje ludis, esperante, pliigi mian havaĵon; mi gajnis, ludis plue kaj malgajnis ĉion, ĉion. Mi devis postlasi mian vestaron kaj kun dudek taleroj piede ekfari la longan vojaĝon al mia kara hejmo, kien tiris min nerezistebla potenco, kaj tiel mi malriĉiĝis je almozulo.

VALENTIN. Jen efektive malĝojiga historio, sed estas necese, ke oni ĝin eksci. Sed pardonu, via moŝto, vi tamen estas iomete mem kulpa. Ne decas, ke mi tion diru, sed sinjoro en situacio, kiel estis via moŝto — oni povus morti pro kolero. Mi ne povas helpi min, mi parolas do kiel mi pensas.

FLOTTWELL. Vi estas prava. Ho, nur nun avertoj ĉiuj, kiujn mi pro tromemfid' kaj fierec' rifuzis, aperas

antaŭ la animo. Cheristane kaj la bild' terura de l' mistera almozulo, kiu tiel longe persekutis min, kaj kies mi devenon certe ne malkovros.

VALENTIN. Nun via moŝto, trankviliĝu nur. Kiel diris mi. Ĉio laŭ konven' de miaj fortoj. Bonvolu via moŝto plej favore intertempe nur eniri en alian ĉambron, por ke ni ĉi tie povu iom kunordigi. Ĝi aspektas tiel malparade. Interne via moŝto iom rondrigardu, tiam via moŝto tie ion vidos, kio vian moŝton certe tre ĝojigos (*kondukas lin ĝis la pordo*).

FLOTTWELL. Ho, fidel' servista, lunon vi similas, ni vin vidas nur, se nia sun' subiris.

VALENTIN. Jen parolado bela, sed mi ĝin ne komprenas. Lisel, infanoj, envenu.

NAŬA SCENO

La antaŭa. La tri infanoj Lise, Hisel, Hansel.

ĈIUJ. Kion patro ordonas?

VALENTIN. Ĉu vi amas vian patron?

ĈIUJ. Jes!

VALENTIN. Ĉu vi volas lin ĝojigi?

ĈIUJ. Jes!

VALENTIN. Vi min ĉagrenis jam sufiĉe. Estu bonaj kaj gentilaj al tiu jen sinjoro. Li restos ĉe ni en la domo. Mi ne plu lasos lin foriri, kaj ankaŭ al patrino diru; ŝi estas bona ino, sed ofte iom kruda.

MICHEL. Ni scias ĝin plej bone, ŝi suferigas nin sufiĉe.

VALENTIN. Ĉu jes? Ja kiom da ĉagrenoj kaj zorgoj la gepatroj al la idoj kaŭzas, estas eksterordinare. Do iru al li. Mi tuj revenos. Mi devas ripari la pordon en la gastejo, kaj ne forgesu, kion mi diris al vi. Li estas malfeliĉa. Kun malfeliĉaj homoj oni devas trakti pli subtile, la feliĉaj pli facile povas elsuferi puŝon.

(*La infanoj foriras en la kabineton.*)

DEKA SCENO

Valentin sola.

Ne! Se oni ĝisvivas tiajn aĵojn! Tiam oni tute erariĝas koncerne la feliĉon. Kion utilas ĉio. La homo konjektas, ĉielo direktas.

KANTO

Disputas pri feliĉ' sen fin'
La homoj inter si,
Stultigas reciproke sin
Kaj mem ne scias pli.
Jen estas plej mizera vir'
Al iu riĉa tro,
Sed ambaŭ sort' per unu tir'
Egalrabotas do.

Perforte volas junular'
Feliĉon de l' moment',
Sed kiam pasis kelka jar',
Jam venos la kontent'.
Se la edzino kun pasi'
Disputas, ho terur',
Elfrapas rabotilon mi
Kaj pensas, grumblu nur.

Se l' mort' min iam kun permes'
Tiretos: venu frat',
Ekrestos mi sen interes'
En kvazaŭ surda stat'.
Sed diros ĝi, jam estas hor'
Por iri el la mond',
Mi metos rabotilon for
Kaj sekvos sen respond' (*for*).

DEKUNUA SCENO

Flottwell (*kun bildo lin prezentanta en junaj jaroj en la mano*). Lise, Hansel, Hisel.

FLOTTWELL. Mi tiel ĝojas, vidi mian bildon en via domo. Mi ne povus vidi ĝin en pli konvenaj manoj. Kiel via patro ĝin ekhavis?

LISE. La patro nin rakontis, ke li aĉetis ĝin en la kastelo, kiam ĉio estis jure aŭkciata.

FLOTTWELL. Jes, jes!

HANSEL. Kaj ĝi ne multekostis. Neniu volis ion doni.

LISE (*kaŝe*). Silentu! Ĉu vi ne scias, kion patro diris?

HISEL (*montras la randon de la bildo*). Jen la dato, kiam via moŝto naskiĝis.

LISE (*rigardas*). La lastan de Julio. (*Ĝoje*) Ho, tiam ja hodiaŭ estas via naskiĝtago! Ho, kiel bele, ĝuste kvindek jaroj!

ĈIUJ TRI. Ni gratulas.

(*Lise forkuras*).

FLOTTWELL. Kiam sun' subiris, estis mi naskita. Kiam ree ĝi subiros, kie mi do estos? (*ekmeditas*).

HISEL (*al Hansel*). Nu, mi ĝojas pli je mia naskiĝtago.

HANSEL. Li jam naskiĝis kvindekfoje, tiel oni kutimiĝas.

LISE (*enkondukas Pepi, kiu nun estas pure vestita laŭ knabeto kaj portas florbukedon*). Jen ankoraŭ gratulanto.

HANSEL (*rigardas el la fenestro*). Ĝuste venas la patrino! (*elkuras*).

LISE (*kore*). Ke ankoraŭ multaj tiaj floroj por via moŝto sur viaj vojoj floru. Ĉi tion ni al vi deziras ĉiuj el tuta koro.

FLOTTWELL (*akceptas profunde tuŝita la bukedon kaj diras*): Mi dankas vin infanoj karaj! (*kaj metas ĝin sur la tablon*). Ho, kial mi per vortoj nur vin povas danki!

DEKDUA SCENO

La antaŭaj. Rosa (*en simpla burĝa vesto, maljuniginta, portas kovritan korbon*). Hansel kaj Michel kun ŝi.

ROSA (*kolere al Hansel*). Kio, resti? vivteni fremdan viron, havante tiom da infanoj por nutri! Ĉu via patro estas freneza! Tio mankus! (*Ekvidas Flottwell*) Jen li estas (*por si*) nu, li aspektas bone!

FLOTTWELL (*kiu sidas ĉe la tablo kaj la parolojn de Rosa ne aŭskultis, ekstaras*). Bonan tagon! kara ino!

ROSA (*malice salutante*). Bonan tagon! sinjoro de Flottwell. Ni ĝojas, ke vi venis por vidi viajn iamajn geservistojn, tiel vi do povas konvinki vin, ke ni estas malriĉaj, sed honestaj gehomoj. En nia domo neniam estis juveloj, ni ankaŭ en via domo ne scipovis tiom permastrumi, kiel certaj personoj, kiuj per tio aĉetis kastelon. Mi kredas, ke vi min komprenis.

FLOTTWELL. Mi ne tute vin komprenas, kara ino! Mi ne memoras precize pri ĉiuj okazaĵoj de mia domo. Nur tion ĉi mi certe scias, ke neniu el servistoj miaj pro mia volo spertis maljustaĵojn.

ROSA (*subtile*). Nu ja! Difinas cirkonstancoj la eldirojn de la homoj. Mi al vi nenion povas diri, sinjoro de Flottwell, ol: ĉirkaŭrigardu ĉe ni. Se vi de ni postuli povas, ke ni en nia limigita stato vivtenu viron, al kiu ni nenion dankas ol nian ĝustan salajron, tiam vi estas libervola resti ĉe ni. Mia edzo estas bona simplulo, li lasas sin al ĉio konsentigi kaj akceptus tutan mondon en la domon, sed mi estas la dommastrino, mi rajtas decidi, mi konas nian situacion, niajn elspezojn, kaj niajn enspezojn. Mi devas zorgi pri miaj infanoj, kiam ili malsatas, kaj mi ne povas doni mian aprobon. Ĝojigas nin, se vi hodiaŭ volos nin honori je tagmanĝo, ni ne lasos nin primoki.

Sed por ĉiam? Pardonu, pri tio mi ne povas konsenti! Hodiaŭ en mia domo kaj neniam plu!

FLOTTWELL (*kun indigna mirego*). Ne! Mi ne aŭdis ĝin! Ĝi estis song'! Ŝi tiel ne parolis al Julius de Flottwell, iama estro ŝia. Al tiu Flottwell, kiu en la orkovrita salonego cent flatulojn vidis ĉe la tablo. Al glorata patro de servistoj liaj. Al amik' plej nobla. Al plej bona, bela, sprit'-kaj orhavanta de la homoj, kaj kiel ĉiuj ĉi mensogoj estas prinomataj, kiujn skribis fidolĉec' ilia sur la plenan glason. Ŝi tiel ne al mi parolis, kiun ĉi bukedo ekflamigi povis al dankemo sankta, kvazaŭ ĝin anĝel' en sin' de l' paradizo estus kolektinta. Ho, in'! Se mi dekonon de feliĉ' perdita mia nur revoki povus, kaj per dekobla mizereg' surjeti vian grizan kapon, ke ĉi tio vin konduki al piedoj miaj devus; tiam mia noblegeco vin instruus, kiom vi en mia malfeliĉo min ĉagrenis (*foriras*).

LISE (*malĝoje*). Sed tion la patrino tamen ja ne devus fari. ROSA (*kolere*). Silentu, kaj foriru tuj en la kuirejon! (*Lise foriras; al la buboj*) Nu, ĉu nenion estas vi farontaj? HANSEL (*ploregas*). Tion mi diros al patro, kiam li venos hejmen (*foriras kun la aliaj*).

ROSA. Tio estus bela mastrajo! Kaj kiel la homo kriis en fremda ĉambro! Kaj li ja ion diris pri griza kapo. Ĉu mi do havas grizan kapon? Tiu homo ja ne havas okulojn en la kapo. Tio tute ne utilas, oni ja devas paroli pro sia afero. Kiu ne malfermas la buŝon, devas malfermi la poŝon. Ho, nun venas mia edzo, al tiu mi diros mian opinion.

DEKTRIA SCENO

La antaŭa. Valentin.

VALENTIN. Do nun la pordo estas ankaŭ jam en ordo. Ho, vi jam estas hejme, kara edzino? Tio estas bona.

ROSA. Jes, feliĉe mi revenis ĝustatempe, por rebonigi viajn senpripensajn faraĉojn.

VALENTIN. Kiajn faraĉojn? Kie do estas la sinjora moŝto.

ROSA. Kie li estos? Kie al li plaĉas!

VALENTIN. Kio? Kion vi diris? Ĉu li ne estas en la kamero?

ROSA. Serĉu lin!

VALENTIN (*enrigardas*). Kie li do estas? (*Pli energie*) Kie li do estas?

ROSA. Ĉu tio estas mia zorgo? Ĉu min koncernas fremdaj homoj?

VALENTIN. Ĉu fremdaj homoj? Ĉu vi do ne kun li parolis?

ROSA (*maleme*). Nu jes?!

VALENTIN. Kio do okazis? Infanoj, envenu ĉiuj!

DEKKVARA SCENO

La antaŭaj. La infanoj. Michel gvidas Pepi.

VALENTIN. Kie estas la sinjora moŝto?

LISE (*embarasite*). Ja mi —

ROSA (*malmodeste*). Nu, kiel vi hezitas? For li estas! Kio plue?

VALENTIN. For li estas? Kial li estas for? Kiam li estas for? Kiel li estas for? Je kioma horo li estas for?

LISE. Ja, la patrino —

VALENTIN. Parolu fine!

ROSA. Nu, diru nur, kial vi timas?

LISE. La patrino diris al li, ke ŝi ne pli longe lasos lin en la domo.

HANSEL (*plorante*). Kaj, ke la patro ĉiam faras tiajn stultajojn.

VALENTIN. Ĉu tion ŝi diris?

HISEL. Tiam li forkuris kaj ploris.
VALENTIN (*ekridegas ironie*). Ha, ha! (*klakas per la manoj*).

ROSA. Nu, kion tio signifas?

VALENTIN. Silentu! Eliru infanoj.

ROSA. Kial do —

VALENTIN. Silentu — jen sidiĝu.

ROSA. Vi! —

VALENTIN (*premas ŝin sur la seĝon*). Sidigu vin. Infanoj foriru (*la infanoj foriras*).

HANSEL (*forirante*). Ne, kio nun okazos en nia domo, tio estas terura (*for*).

DEKKVINA SCENO

Rosa. Valentin, sen infanoj.

ROSA (*eksaltas*). Nu, kion tio signifas?

VALENTIN. Nur paciencon! Mi ne volis vin hontigi antaŭ la infanoj, kiel vi min. Kion vi nu preferas, ĉu vi volas mian moŝtsinjoron lasi en la domo, aŭ mi foriros ankaŭ.

ROSA. Kio? Kiajn aferojn vi volas komenci pro fremda homo?

VALENTIN. Ĉu al vi li estas fremda? Al mi ne. Homo, al kiu mi ŝuldas dankon, por mi ne povas iĝi fremda.

ROSA. Vi estas patro, vi devas zorgi por viaj infanoj.

VALENTIN. Li ankaŭ estas mia infano, mi lin adoptis.

ROSA. Nu, li estas juna infano.

VALENTIN. Jes, tiel juna, kiel vi, li certe ne estas, ĉar vi kondutas kiel kvarjara.

ROSA. Resume, mi nepre netoleris lin en la domo.

VALENTIN. Ĉu vi lin ne toleras? Infanoj eniru.

DEKSESA SCENO

La antaŭaj. Ĉiuj infanoj.

ĈIUJ INFANOJ. Kion la patro ordonas?

VALENTIN. Vestu vin, vi iros kun mi.

HISEL. Kien do patro?

VALENTIN. Vi vidis jam, al la glitejo ni ne iros. Kunprenu ĉion. Viajn studaĵojn, la nomlibreton, la tutan bibliotekon, la rabotilon, la tutan ilaron, ĉion!

ROSA. Ho, tiaĵon mi ankoraŭ ne ĝisvivis.

VALENTIN. Ĉu ne? Ho, ekzistas aĵoj, pri kiuj nia filozofio eĉ ne sonĝas.

HANSEL. Sed hodiaŭ la patro kuraĝas, jen bone.

ROSA (*apogas la manojn kokse*). Ĉu vi volas preni la infanojn el la domo?

LISE. Sed patro, kio do okazu? Tio ja estas terura.

VALENTIN (*al Lise*). Ĉu vi volas resti ĉe via patrino?

LISE. Jes, tio estas mia devo.

VALENTIN. Do iru al ŝi! (*Lise iras tien.*) Buboĵ venu ĉi tien. (*La buboĵ iras al lia flanko.*) Jen la apogiloj de mia regno, ili apartenas al mi. Pretigu vin (*la buboĵ prenas ĉion*).

HISEL. Kion mi ankoraŭ prenui!?

VALENTIN. La cirkelon, ronda bubo.

ROSA. Li fakte agas serioze, en mia vivo mi ne estus ĝin kredinta.

LISE. Cedu, kara panjo.

VALENTIN. Nun estas preta la eliro. Nun, atentu, nun, mi komandos: dekstren turnu, mars'! (*volas for*).

ROSA (*penteme postvokas lin*). Vi, edzo, haltu!

VALENTIN. Kio do?

ROSA. Mi devas ion diri al vi!

VALENTIN (*por si*). Aha! Nun komenciĝos la traktadoj. (*Laŭte*) nur mallonge, tion mi diras tuj!

ROSA (*mallaŭte*). Elirigu la infanojn.

VALENTIN. Infanoj foriru!

LISE (*por si*). Dank' al ĉielo!

HANSEL. Ŝajnas al mi, ke la panjo tamen cedos. Ja, se ni viroj foje komencas, tiam la afero devas aŭ rompiĝi aŭ sukcesi (*la infanoj for*).

DEKSEPA SCENO

La antaŭaj, sen infanoj.

VALENTIN. Do kion vi volas?

ROSA (*boneme*). Vidu, pripensu ĝin, vi konvinkiĝos, ke mi estas prava.

VALENTIN. Silentu, aŭ mi vokos la infanojn.

ROSA. Do lasu ilin ekstere, ili ja difektos tro da ŝuoj, irante ĉiam tien kaj reen.

VALENTIN. Tio ĉi al vi nenion helpas! *aut, aut*, ĉu, ĉu —

ROSA. Bone, mi ĝin pripensos.

VALENTIN. Nenia pripenso, ankoraŭ hodiaŭ li devas reveni, kaj festeno devas pretiĝi, ke la homaro kunbatu la manojn super la kapo.

ROSA. Nu, mi konsentas, sed li tion ne meritas pro ni.

VALENTIN. Kion vi diras? Ke li ĝin ne meritas? Kiu do estas kulpa, ke ni tiel pace kunvivas, ke mi povis fariĝi majstro kaj konstrui tiun ĉi dometon, krom la ducent dukatoj, kiujn mi iom post iom de li donace ricevis. Al kiu ni do danku nian ioman havaĵon?

ROSA. Sed min li neniam volis.

VALENTIN. Ne estas vere! La ĉambristo vin nur kalumniis, alie ni ankoraŭ estus en lia domo.

ROSA. Jes, se li iun havus.

VALENTIN. Ho jes, tion mi tute forgesis.

ROSA. Li min je ĉiu okazo malvalorigis, foje li eĉ antaŭ tuta societo diris —

VALENTIN. Kion li diris?

ROSA. Tion mi ne diros.

VALENTIN. Nu diru ĝin al mi, kara edzineto, eble tio ne estas vera.

ROSA. Jes, tio ne estas vera. Li diris, ke mi estas malrekta.

VALENTIN. Tion li diris? Kaj tion vi ankoraŭ post dudek jaroj memoris?

ROSA. Ho, tion virino neniam forgesas!

VALENTIN. Nu, tion vi devas pardoni al li. Mia Dio! Juna homo! li tiam havis nur tiajn malrektajn opiniojn, kaj krome tio ja ne estas vera, vi ja estas kreska kiel egipta piramido, kiu povus kritiki vian staturon, tio ja vere estus kalumnio unuaspeca.

ROSA. Nu, mi ankaŭ havas tiun opinion.

VALENTIN. Ĉu ne, edzineto, ni lasos lin en nia domo. Vi vidos, mi laboros tre diligente, tio ne malutilos al mi. Kontraŭe eĉ al mi ĝi faciligos laboron.

ROSA (*post ioma hezito*). Nu, pro mi estu tiel.

VALENTIN (*saltas pro ĝojo*). Brava Rosel! Tion mi devas atendis. Mi ja ne estus lasinta vin, se mi eĉ estus foririnta hodiaŭ, morgaŭ vespere mi certe estus reveninta. Sed nun estas ĉio en ordo. Infanoj, envenu la lastan fojon.

DEKOKA SCENO

La antaŭaj. Ĉiuj infanoj.

VALENTIN. Infanoj! remetu ĉion, ni ne eliros. Mi kun la mastrino jen faris novan kontrakton, patro kaj patrino repaciĝis, la sinjora moŝto venos en la domon.

ĈIUJ INFANOJ (*ĝoje*). Bonege, bonege!

VALENTIN. Tial kuru, kiom vi povas, neniun restu hejme. Mi prenos la bubeton (*prenas Pepi sur la brakon*). Iru

al ĉiuj najbaroj, demandu ĉu ili ne vidis lin. Ili helpu al vi serĉi lin, kaj trovinte lin, alportu lin ĉi tien.

ROSA. Tiu viro ja frenezigos pro pura ĝojo.

INFANOJ. Brave! Nun fariĝos gaje (*for*).

HANSEL. Patro, ke patro fidu je mi, se mi lin kaptos, li ne plu liberiĝos (*foriras fiere*).

VALENTIN. Nun, edzino, venu; vi hodiaŭ multe min ĉagrenis, sed nun jam ĉio estas pardonita. Neniu homo estas sen eraroj, se li nur ĝustatempe prudentiĝas. Kiu scias, kiu foje rekompencos ĝin; kaj mi do pensas, ke, fariĝinte iam tre maljuna, mi tamen volus havi aliajn rememorojn ol nur, ke mi kungluis seĝpiedon aŭ fabrikis komodon. Nun venu!

(*Ambaŭ for.*)

DEKNAŬA SCENO

La ruinoj de la malnova Flottwell-kastelo.

Disfalintaj salonoj kaj turoj, konstruitaj sur rokoj, vidiĝas dekstre. Maldekstre, kvazaŭ la elvido el la kastelmonto al malproksimaj, kontraŭstarantaj montoj, post kiu la suno malleviĝas.

FLOTTWELL (*malespere grimpante trans roko, kvazaŭ li venus el la valo*).

Jen estas mi! Jam mi atingis la
Altaĵon lastan, kiun en ĉi mond'
Ankoraŭ mi surgrimpi devis.
Sur avaj staras mi lulil' kaj ĉerk',
Sur de Flottwell nobela prakastelo.
Falegis ambaŭ ni pro la fatal'.
Ni starus, se mi ne forlasus vin.
Ho, tro malfrue! (*Forĵetas la ĉapelon kaj la
almozbastonon*) Putru vi bastono.
Mizero mia restu sen apogo.

Al via mond' mi ne revenos plu,
Ĉar mia krim' ekzilas min el rond'
De l' egoismo. Kontraŭ la majest'
De l' or mi pekis kaj ne pensis, ke
Uzurpis tiu ĉi metalo la
Regadon, antaŭ kiu devus mi
Ektremi, ĉar per admirinda ruz'
Al sia sfero ĝi altiris eĉ
La noblon. Tiu sentas sin feliĉa,
Al kiu eblis esti kuracist'
Homara per bonfar', kaj nun ne plu,
Pro manko de la ora kuracil'
Por la sanigo de l' malsana mondo.
Mi staris sur benita ĉi altaĵ'
Kaj povis ĝoji pri feliĉo de
Aliaj kun malĝoj' en propra koro.
Mi mem ĵetegis min de sankta tron'
Ĉi tiu. Tion sole rajtas mi
Priplori, pluon ne. Objekto de
Infana mok' kaj popolaĉa rid'
Ne iĝu nobla viro, tial for,
Vi mia vivo, kies pulsobat'
Honoro estis. Mi ja povus min
Ĵetegi en abismon tiun, sed
Plej lasta Flottwell ne kliniĝu tro.
La sola, kiun lasis malŝparem'
Al mi, ja estas mia vivo, ĝin
Nur ŝparos mi. Mortigu la malsat'
Maltuje min, je pun', ke l' mondon mi
Sendankan nutris tro. Ho, morto, vi
Konsol' min estas sola, kaj amiko!

(*Ŝtono recedas kaj la almozulo, sen ĉapelo kaj bastono staras antaŭ li.*)

DUDEKA SCENO

Almozulo. Flottwell.

ALMOZULO. Krom mi.

FLOTTWELL (*ektimas*). Krom vi? Terura ho statur'

Jam nevidita depost dudek jaroj,
Kaj kiun mi nur nun ekkonas mia,
Ĉar egaligas min la temp' al vi,
Kaj mi, samkiel vi, mizera nun
Kaj kompatinda estas. Ve al mi!
Nun mi komprenas vin: Terura bild'
De la averto estis vi por mi!

ALMOZULO. Jen mia cel'. Vi ne ekkonis min,

Ne konas siajn mankojn la pasio,
Nun konu plene min, mi estas jar'
El via viv' rapide konsumita,
Kvindeka nome, kiu pasos tuj
Post la subiro de ĉi tiu suno.
Al Cheristan' donacis jaron vi,
Kaj nobla ĉi fein' — por vi ofero —
En libro de l' estonto vidis, ke,
Se vi la vojon de l' malŝparo ne
Forlasos, portos la kvindeka jar'
De via viv', pro via senpripens',
Al vi premie la almozbastonon.
Ne kredu, ke fininta estus vi
Ĉi tie; kiu staris kiel vi
Kaj tiel suben malleviĝas, pli
Malalten falas ol naskit' en marĉo.
Ne estis avertebla vi, do mi
Nur povis savi vin de l' falo plej
Profunda. Vi ĝis nun donacon ne
Ricevis. Mi petegis ĉe vi mem
Por vi. Dum unu jar' per ruz' kaj tim'

De vi mi eldevigis la tributon.

La lastan horon mi konservis, ĝi

Dormadis en ĉi ŝton' kaj diras vin:

(*Stono dividiĝas kaj amaso da oro kaj juvelo montriĝas en argenta kesteto.*)

Reprenu la al mi donitan havon;
Vi nun pli bone ŝatos ĝin, ĉar vi
La mondon konas nun laŭ propra sorto.
Doniton al la malriĉul' vi ja
Plenproprasence donis al vi mem.
Adiaŭ! Mi plenumis la mision (*profundiĝas*).

FLOTTWELL. Ĉu song', ĉu vero estas la aŭdito?

De kie la ne tera fenomeno?

DUDEKUNUA SCENO

*Dolĉa muziko. La ruinoj aliĝas je nubogrupej kun multaj genioj.
Cheristane en ĉarma feinvesto en ilia mezo sur florumeturo.*

Cheristane. Flottwell.

CHERISTANE (*dolĉe*). Ho, Julius, Azur' ĝi estis la

Geni' de l' lasta perlo, kiun mi
Ĝojege foroferis, kiam pro
La dolĉa am' al vi mi devis per
Maldolĉa forekzilo penti. Ah!
Al mi la sort' vin ne permesis savi,
Li faris, kion mia fidelec'
Promesis vin.

FLOTTWELL (*genuas*). Ho, Cheristane! Vin

Ekvidos mi denove sur ĉi tero,
Ĉiela bild' el mia rozotemp'
Okulo velka sin apenaŭ levas
Al matenruĝ' de via jun' eterna.
Ho, ne foriru. Vidu, kiel jam
La ve' pro l' temp' pasinta min mortigas.

CHERISTANE. Ne malesperu, kara Julius,
Toleru la mallongan vivosorton,
Ni certe nin revidos iam. Tie,
En la senlima regno de la am'
En renkontejo de spiritoj ĉiuj.
(*Ŝi forflugas dum elegia muziko, la ruinoj denove montriĝas.*)

DUDEKDUO SCENO

La antaŭa. Lise, poste Valentin, Rosa kaj la infanoj.
LISE. Patro! Patro! tien ĉi, jen estas la sinjora moŝto ankoraŭ tute sana kaj bonfarta.

FLOTTWELL. Kiu serĉas min? (*fermas la kesteton*).

VALENTIN (*venas*). Ni ĉiuj, via moŝto, la tuta vilaĝo estas supre.

FLOTTWELL. Kion vi volas, bona Valentin?

VALENTIN. Kion mi volas? Mian vorton plenumi al via moŝto, kaj pardonon peti por edzino mia krudemora. Ĉi tien venu, krimulino, kaj genuigu vin.

ROSA (*kore*). Kara sinjora moŝto, hodiaŭ mi tre fikondutis, sed mi korektos min. Neniam plu forlasu nian domon. Filine mi vin flegos certe.

LA INFANOJ. Pardonu, via moŝto, ŝin!

PEPI (*genuigas sin*). Pardonu, kara moŝto, vi,
Patrino agis sen konsci'.

VALENTIN (*ploras*). Tion mi poetis, via moŝto.

FLOTTWELL. Ekstaru, bonaj homoj, mi jam pardonis kaj ĝojas, ke mi fidelon vian povas rekompenci. Mi ne plu estas almozulo. Sub ĉi tiuj muroj mi ĵus trovis trezoreton, kiun mia patro tie ĉi por mi konservis.

VALENTIN. Ho, kia malfeliĉo, kaj mi ĝojis jam, ke via moŝto ne plu ion havas, por ke mi povu vian moŝton nun subteni.

FLOTTWELL. Pli bone estas tiel, kara Valentin, vi povas vian vivon nun trankvile ĝui. Mi prenas vin kun la edzin' en mian domon kaj zorgos pri l' eduko de infanoj viaj.

ROSA, LISE (*ĝojigite*). Ni kore dankas, via moŝto.
HANSEL (*al la infanoj*). Buboĵ, nun ni ĉiuj fariĝos moŝtsinjoroj.

VALENTIN. Mi fariĝos la domlignaĵisto ĉe via moŝto. Mi tinkturos kaj poluros la tutan domon. Sed ion mi ankoraŭ devas diri! Tuta amaso de miaj malnovaj najbaroj ankaŭ proponis, subteni vian moŝton, kaj ĝojas revidi sian iaman bienestron. Via moŝto bonfaris ja al ĉiuj, kaj bonan estron oni ne forgesas tiel facile.
ĈIUJ. Vivu la sinjora moŝto, vivu!!

FINKANTO

VALENTIN. Ni estas feliĉaj nun post la alven',
Pigmeo malgranda sin montras ĉagren',
Kaj se ĝi revenus en kiu ajn hor'
Tuj pelos el domo ĝin Valentin for.

LA ĤORO (*ripetas la lastajn du versojn*).

(*Oni vidas, kiel en malproksimo sur la montoj gepaŝtistoj pelas la bovinojn de sur la alpoj kaj kantas kiel eho:*)

Dudeldide, dudeldide, bovinoj el la alp', dudeldide.

VALENTIN. Bovinojn hejmpelas el alp' oni jam,
Kontento ja estas plej bona balzam'.
Maldormas riĉulo en ora la hal',
Dormetas senzorge bovin' en la stal'.


ĤORO (*postkantas*).

GEPAŜTISTOJ. Bovina ĝoj' — la stal'. Dudeldide. —

VALENTIN. Nun iru al tablo ni, al la festen',
Hodiaŭ finiĝis jam ĉiu ĉagren'.
Honoran mi lokon konservos je fin',
Ĉar eble eksidos kontento sur ĝin.

ĤORO (*postkantas*).

GEPAŜTISTOJ. Dudeldide, kontentaj estu ni!



INTERNACIA MONDLITERATURO

La kolekto estas submetita al la gvidado de **Prof. D-ro Joh. Dietterle**, direktoro de la Esperanto-Instituto por la Germana Respubliko. Ĝi enhavas nur la plej famajn verkojn el ĉiuj naciaj literaturoj. Ĝis nun aperis:

Volumo 1:

Goethe, J. W. von: Hermano kaj Doroteo. Eposo idilia. El la germana originalo trad. *B. Küster*. 2a, korektita eldono. Kun antaŭparolo de *Prof. D-ro Joh. Dietterle*. 1922. 77 paĝoj. Kartonita.

Volumo 2:

Nijemowski, A.: Legendoj. El la pola originalo trad. *B. Kuhl*. Kun antaŭparolo de *Antoni Grabowski*. 2a, korektita eldono. 1923. 74 paĝoj. Kartonita.

Volumo 3:

Turgenev, Ivan S.: Elektitaj noveloj. El la rusa originalo trad. *A. Mexin*. 1923. 81 paĝoj. Kartonita.

Volumo 4:

Raabe, Wilhelm: La nigra galero. Historia rakonto. El la germana originalo trad. *Prof. D-ro Fritz Wicke*. 2a, korektita eldono. 1922. 64 paĝoj. Kartonita.

Volumo 5:

Hildebrand: El la „Camera Obscura“. El la holanda originalo trad. *H. C. Mees*. 1923. 64 paĝoj. Kartonita.

Volumo 6:

Irving, Washington: El la skizlibro. El la angla originalo trad. *H. L. Elvin*. 1923. 64 paĝoj. Kartonita.

Volumo 7:

Chamisso, A. de: La mirinda historio de Petro Schlemihl. El la germana originalo trad. *Eug. Wüster*. 1922. 84 paĝoj. Kartonita.

Volumo 8:

Stamatov, G. P.: Nuntempaj rakontoj. El la bulgara originalo trad. *Iv. H. Krestanoff*. 1922. 80 paĝoj. Kartonita.

Volumo 9:

Ŝalom-Aleĥem. Perec.: Hebreaj rakontoj. El la hebreaj originaloj trad. *Is. Muĉnik*. 1923. 78 paĝoj. Kartonita.

Volumo 10:

Puŝkin, A. S.: Tri noveloj. El la rusa originalo trad. *D-ro A. Fiŝer*. 1923. 67 paĝoj. Kartonita.

FERDINAND HIRT & SOHN EN LEIPZIG
ESPERANTO-FAKO

INTERNACIA MONDLITERATURO

Volumo 11—12:

Ariŝima, T.: Deklaracio. Romano. El la japana originalo trad. *T. Toogun*. 1924. 125 paĝoj. Kartonita.

Volumo 13:

Poe, Edgar, Allen: Ses noveloj el „Rakontoj de mistero kaj imago“. El la angla originalo trad. *A. Frank Milward*. 1924. 80 paĝoj. Kartonita.

Volumo 14:

Balzac, Honoré de: La firmao de la kato, kiu pilkludas. El la franca originalo trad. *Paul Benoit*. 1924. 75 paĝoj. Kartonita.

Volumo 15:

Doroŝeviĉ, Vlas: Orientaj fabeloj. El la rusa originalo trad. *Nikolao Hohlov*. 1924. 64 paĝoj. Kartonita.

Prezo po volumo 1.—Gmk.

La kolekto estas daŭrigata!

Dietterle, Prof. D-ro Joh.: La Vendreda Klubo.

11 originalaj artikoloj. Kun unu portreto kaj kelkaj desegnaĵoj. 1921. 115 paĝoj

broŝurita 1,60 Gmk.

Forge, Jean: Abismoj. Romano originale verkita. 1923.

150 paĝoj

broŝurita 1,80 „

bindita 2,75 „

Luyken, H. A.: Stranga Heredaĵo. Romano originale

verkita. 1922. 320 paĝoj

broŝurita 3.— „

bindita 4.— „

Luyken, H. A.: Pro Iŝtar. Romano el la antikva Babela

historio. Originale verkita. 1924. 304 paĝoj

broŝurita 3.— „

bindita 4.— „

Privat, D-ro Edmond: Historio de la lingvo Esperanto. Deveno kaj komenco 1887—1900. 1923. 2a eldono.

74 paĝoj

kartonita 1,25 „


Privat, D-ro Edmond: Vivo de Zamenhof. Kun

portreto de D-ro L. L. Zamenhof. Speciala eldono por mezkaj malbonvalutaj landoj. 1923. 109 paĝoj

kartonita 2.— „

bindita 3.— „

FERDINAND HIRT & SOHN EN LEIPZIG
ESPERANTO-FAKO



104407
Esp